



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報週

3


1971

## Vortoj de Prezidanto Maŭ

La sepcentmilionna ĉina popolo estas potenca apogilo por la vjetnama popolo, kaj la vasta teritorio de Ĉinio estas fidinda postfronto de la vjetnama popolo.

La popolo de malgranda lando certe povas venki agreson de granda lando, se nur ĝi kuraĝas leviĝi al batalo, kuraĝas preni armilojn kaj mastras la sorton de sia propra lando.





La granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ



Kiam Huang Jongŝeng, estro de la Ĝenerala Stabo de ĈPLA, akompanas Dang Tran Thi, estron de la Delegacio de CK de NFSV, veturi en senkovra aŭtomobilo tra Tian-anmen-placo, ĉe la alveno de la delegacio al Pekino, ĝi estas varme bonvenigata de la amasoj.

Dum sia vizito al nia lando, la Delegacio de la Centra Komitato de la Nacilibera Fronto de Suda Vjetnamio sub la gvido de Dang Tran Thi, membro de la Prezidantaro de CK de NFSV ricevis varman bonvenigon de niaj partiaj kaj registaraj gvidantaj kamaradoj kaj popoloj. Tio plene manifestis la fratecon inter la ĉina kaj vjetnama popoloj dividantaj inter si ĝojon kaj malĝojon kaj ilian firman decidon de unuigo kaj batalo. Ĉinio kaj Vjetnamio estas frataj najbaroj. En la komuna batalo kontraŭ la usona imperiismo, la ĉina kaj vjetnama popoloj intime interligiĝas kaj subtenas unu la alian. La grandaj venkoj akiritaj de la vjetnama popolo en la kontraŭusona naciŝava milito estas grandaj kuraĝigo kaj helpo al la ĉina popolo. La subteno de la ĉina popolo al la vjetnama popolo estas nia plenumenda devo internaciisma. Kiel ajn freneze baraktados la usona imperiismo, la sepcentmiliono popolo de Ĉinio, same kiel antaŭe, tuforte subtenos la kontraŭuson naciŝavan militon de la vjetnama popolo kaj de la popoloj de la aliaj du hindoĉiniaj landoj ĝis ĝia plena triumfo.

Dum la vizitado de la Delegacio de CK de NFSV al nia lando, Ĉefministro Ĝou Enlaj kaj aliaj gvidantaj kamaradoj de la Partio kaj registaro intervidiĝis kun la vjetnamaj kunbatalantoj kaj tre intime interparolis kun ili.

Kaj la delegacio faris vizitadon al la suda parto de nia lando kaj reiris al sia lando je la 11-a de januaro, 1971.



# La Delegacio de la Centra Kom Fronto de Suda Vjetnamio

Gvidantaj kamaradoj de niaj Partio kaj registaro Ĝou Enlaj, Huang Jongŝeng, Jaŭ Venjuan, Vu Fahian, Mojuo sin fotigas kune kun la vjetnamaj kunbatalantoj dum la intervidiĝo.





# Comitato de la Naciliberiga nino Vizitis Nian Landon

Fahian, Li Zuopeng, Kiu Hujzuo, Gi Dengkuj, Li Deŝeng, Vang Donghing kaj Guo



# Solena Kunveno en Pekino por Celebri la 10-an Datrevenon de la Fondiĝo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio

**L**A 20-a de decembro de 1970 estis la 10-a datreveno de la fondiĝo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio — la granda standardoportanto de la sudvjetnama popolo en batalo por liberiĝo. Dekmilo da revoluciaj popolanoj de nia ĉefurbo okazigis tiutage solenan kunvenon por varme celebri la brilan festotagon de la sudvjetnama popolo, aklami la brilajn venkojn akiritajn de la vjetnama popolo en ĝia nasisava batalo kontraŭ la usona agreso kaj esprimi la firman decidon de la ĉina popolo tutforte subteni la vjetnaman popolon ĝis kompleta gajno de ĝia nasisava milito kontraŭ la usona agreso.

La kunvenon ĉeestis laŭ invito Dang Tran Thi, estro de la Delegacio de la Centra Komitato de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj membro de la Prezidantaro de CK de NFSV, Nguyen Van Quang kaj Dang Hai Van, vicestroj de la delegacio, kaj membroj de la delegacio Bui Thi Thanh Van, Ngo Van Ranh, Huynh Quang Thuyen, Dang Kim Ngon kaj Tran Quang Kiem, kiuj venis al Ĉinio por partopreni celebradojn.

Ĝin ĉeestis gvidantaj kamaradoj de la Partio kaj registaro de nia lando Ĝou Enlaj, Huang Jongŝeng, Jaŭ Venjuan, Vu Fahian, Li Zuopeng, Kiu Hujzuo, Gi Dengkuj, Li Deŝeng, Vang Donghing kaj Guo Mojuo.

Samdek Norodom Sihanuk, la ŝtatestro de Kamboĝo kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kamboĝo, kaj sinjorino Sihanuk, kaj Samdek Penn Nouth, prezidanto de la Politika Buroo de CK de NUFK kaj ĉefministro de la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo, kaj sinjorino Penn Nouth ĉeestis la kunvenon laŭ invito kaj sidis en la unua vico sur la podio.

Laŭ invito ĉeestis la kunvenon kaj sidis en la unua vico sur la podio ankaŭ:

Bui Tan Linh, provizora aferŝarĝito de la Ambasadorejo de la Vjetnama Demokratia Respubliko en Pekino, kaj sinjorino Bui Tan Linh, kaj Tran Huu Du, vicministro de malpeza industrio de VDR dume vizitanta Ĉinion;

Laosaj geamikoj Generalo Huon Mongkhunvilay kaj sinjorino Huon Mongkhunvilay; kaj Kim Ĝej Suk, provizora aferŝarĝito de la Ambasadorejo de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio en Pekino.

La kunveno okazis en la grandioza Popola Halo. La oficiala standardo de la Respubliko de Suda Vjetnamio kaj la nacia standardo de Ĉinio pendis flankon ĉe flanko sur la funda muro de la podio. Gigantaj rubandegoj ornamas la kunvenejon kun sloganoj: “Vivu la granda amikeco kaj batala unuiĝo inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio!” “Firman subtenon al la vjetnama popolo en ĝia

Membroj de la Popola Komunumo de Amikeco inter Ĉinio kaj Vjetnamio en antaŭurbo de Pekino ĝoje kunvenas kun vjetnamaj kunbatalantoj por kune celebri la 10-an datrevenon de la fondiĝo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio.

En la kunveno, delegaciestro Dang Tran Thi faris paroladon laŭ invito.



Post rigardo de la revolucia moderna baleto "Ruĝa Virina Taĉmento", la vjetnamaj kunbatalantoj ascendis la scenejon kaj fotiĝis kune kun la geaktoroj.







# Solena Kunveno en Pekino por Celebri la 10-an Datrevenon de la Fondiĝo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio

**L**A 20-a de decembro de 1970 estis la 10-a datreveno de la fondiĝo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio — la granda standardoportanto de la sudvjetnama popolo en batalo por liberiĝo. Dekmilo da revoluciaj popolanoj de nia ĉefurbo okazigis tiutage solenan kunvenon por varme celebri la brilan festotagon de la sudvjetnama popolo, aklami la brilajn venkojn akiritajn de la vjetnama popolo en ĝia nancisava batalo kontraŭ la usona agreso kaj esprimi la firman decidon de la ĉina popolo tutforte subteni la vjetnaman popolon ĝis kompleta gajno de ĝia nancisava milito kontraŭ la usona agreso.

La kunvenon ĉeestis laŭ invito Dang Tran Thi, estro de la Delegacio de la Centra Komitato de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj membro de la Prezidantaro de CK de NFSV, Nguyen Van Quang kaj Dang Hai Van, vicestroj de la delegacio, kaj membroj de la delegacio Bui Thi Thanh Van, Ngo Van Ranh, Huynh Quang Thuyen, Dang Kim Ngon kaj Tran Quang Kiem, kiuj venis al Ĉinio por partopreni celebradojn.

Ĝin ĉeestis gvidantaj kamaradoj de la Partio kaj registaro de nia lando Ĝoŭ Enlaj, Huang Jongŝeng, Jaŭ Venjuan, Vu Fahian, Li Zuopeng, Kiu Hujzuo, Gi Dengkuj, Li Deŝeng, Vang Donghing kaj Guo Moĵuo.

Samdek Norodom Sihanuk, la ŝtatestro de Kamboĝo kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kamboĝo, kaj sinjorino Sihanuk, kaj Samdek Penn Nouth, prezidanto de la Politika Buroo de CK de NUFK kaj ĉefministro de la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo, kaj sinjorino Penn Nouth ĉeestis la kunvenon laŭ invito kaj sidis en la unua vico sur la podio.

Laŭ invito ĉeestis la kunvenon kaj sidis en la unua vico sur la podio ankaŭ:

Bui Tan Linh, provizora aferŝarĝito de la Ambasadorejo de la Vjetnama Demokratia Respubliko en Pekino, kaj sinjorino Bui Tan Linh, kaj Tran Huu Du, vicministro de malpeza industrio de VDR dume vizitanta Ĉinion;

Laosaj ĝeamikoj Generalo Huon Mongkhunvilay kaj sinjorino Huon Mongkhunvilay; kaj Kim Ĝej Suk, provizora aferŝarĝito de la Ambasadorejo de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio en Pekino.

La kunveno okazis en la grandioza Popola Halo. La oficiala standardo de la Respubliko de Suda Vjetnamio kaj la nacia standardo de Ĉinio pendis flankon ĉe flanko sur la funda muro de la podio. Gigantaj rubandegoj ornamas la kunvenejon kun sloganoj: “Vivu la granda amikeco kaj batala unuiĝo inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio!” “Firman subtenon al la vjetnama popolo en ĝia






Kiam Huang Jongŝeng, estro de la Ĝenerala Stabo de ĈPLA, akompanas Dang Tran Thi, estron de la Delegacio de CK de NFSV, veturi en senkovra aŭtomobilo tra Tian-anmen-placo, ĉe la alveno de la delegacio al Pekino, ĝi estas varme bonvenigata de la amasoj.

Dum sia vizito al nia lando, la Delegacio de la Centra Komitato de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio sub la gvido de Dang Tran Thi, membro de la Prezidantaro de CK de NFSV ricevis varman bonvenigon de niaj partiaj kaj registaraj gvidantaj kamaradoj kaj popoloj. Tio plene manifestis la fratecon inter la ĉina kaj vjetnama popoloj dividantaj inter si ĝojon kaj malĝojon kaj ilian firman decidon de unuiĝo kaj batalo. Ĉinio kaj Vjetnamio estas frataj najbaroj. En la komuna batalo kontraŭ la usona imperiismo, la ĉina kaj vjetnama popoloj intime interligiĝas kaj subtenas unu la alian. La grandaj venkoj akiritaj de la vjetnama popolo en la kontraŭusona naciŝava milito estas grandaj kuraĝigo kaj helpo al la ĉina popolo. La subteno de la ĉina popolo al la vjetnama popolo estas nia plenumenda devo internaciisma. Kiel ajn freneze baraktados la usona imperiismo, la sepcentmiliono popolo de Ĉinio, same kiel antaŭe, tuforte subtenos la kontraŭusonon naciŝavan militon de la vjetnama popolo kaj de la popoloj de la aliaj du hindoĉiniaj landoj ĝis ĝia plena triumfo.

Dum la vizitado de la Delegacio de CK de NFSV al nia lando, Ĉefministro Ĝou Enlaj kaj aliaj gvidantaj kamaradoj de la Partio kaj registaro intervidiĝis kun la vjetnamaj kunbatalantoj kaj tre intime interparolis kun ili.

Kaj la delegacio faris vizitadon al la suda parto de nia lando kaj reiris al sia lando je la 11-a de januaro, 1971.





*Sur la podio de la kunveno*


nacisava milito kontraŭ la usona agreso!” Kiam la kunbatalantoj el Vjetnamio, Kamboĝo, Laoso kaj Koreio venis al la podio en akompano de ĉinaj gvidantaj kamaradoj, la tuta ĉeestantaro stariĝis kaj ilin salutis per longdaŭra varma manklakado.

En la kunveno kamarado Jaŭ Venjuan, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la unua paroladis en la nomo de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉinaj registaro kaj popolo, esprimante plej korajn gratulojn kaj plej altan respekton al la heroa sudvjetnama popolo batalanta sur la plejfronto kontraŭ la usona imperiismo.

Li diris: Antaŭ dek jaroj, en la grava momento, kiam la usona imperiismo pliintensigis sian agreson kontraŭ suda Vjetnamio, la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio glorie naskiĝis en la batala ŝtormo de la sudvjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo. Alte tenante la standardon de nacisava batalo kontraŭ la usona agreso, ĝi plene mobilizis la popolon, faris popolan militon firme sin apogante sur la popolo, kondukis la liberigan batalon de la sudvjetnama popolo en tute novan historian etapon, kaj starigis tre grandajn meritojn por la sudvjetnama popolo.

En la pasintaj dek jaroj, sub la firma gvido de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio, disvol-

vante la revolucian spiriton de **“firma decido batali kaj venki”**, la heroa sudvjetnama popolo faris longan kaj ekstreme malfacilan bataladon kontraŭ la usona imperiismo plej feroce en la mondo, kaj akiris brilajn venkojn unu post alia. Sub la peza bato de la sudvjetnama popolo, falis la diktatora reĝimo de la kliko de Ngo Dinh Diem — fidela lakeo de la usona imperiismo; tute bankrotis la t.n. “speciala milito”, en kiu Usono provizis monon, pafilojn kaj konsilantojn kaj la sudvjetnamaj pupoj liveris homojn. En la lastaj ĉirkaŭ ses jaroj, la rekta armita agreso de la usonaj trupoj en nombro de centoj da miloj same finiĝis per hontinda malvenko. Post longdaŭra malfacila luktado, la popolaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio ĉiam pli kreskas kaj fortiĝas, la liberigitaj regionoj senĉese firmiĝas, la politika batalo de la popolo en la regionoj okupataj de la malamiko kontraŭ la regado de Usono kaj pupa reĝimo disvolviĝas kun ĉiu tago. La Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj la Provizora Revolucia Registaro de Respubliko de Suda Vjetnamio jam gajnis pli kaj pli vastajn simpatiojn kaj subtenon internacie. La dek jaroj post la naskiĝo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio estas jaroj en kiuj la sudvjetnama popolo faris heroan, obstinan, sangan batalon kaj en kiuj la sudvjetnama popolo marŝis de venko al venko sur la larĝa vojo de la nacisava batalo kontraŭ la usona agreso.



Decideme sekvante la instruon de sia granda gvidanto Prezidanto Ho Chi Minh: **“Ĉio por venki la usonajn agresantajn rabistojn!”**, timante nek malfacilojn nek vivoferojn, kaj produktante dum bataltempo, la heroa popolo de norda Vjetnamio faris malcedemajn batalojn kontraŭ la usona imperiismo kaj akiris brilajn venkojn. Malgraŭ ke la usona imperiismo faris furiozan bombadon kontraŭ norda Vjetnamio kaj aplikis ĉiajn kruelajn detruajn rimedojn, la socialisma Vjetnama Demokratia Respubliko ĉiam staras majeste sur la sudorienta antaŭposteno de Azio kiel fortika citadelo de batalo kontraŭ la usona imperiismo.

La praktiko de batalo de la vjetnama popolo elokvente pruvis, ke la vekiĝinta revolucia popolo estas nevenkebla kaj se ĝi nur kuraĝas alpreni armilojn, persiste batalas kaj konstante resumas sian sperton en la batalo, ĝi certe povas kreski de malgrandeco al grandeco kaj de malforteco al forteco kaj gajni la kontraŭagresan militon. Ĉiuj aspekte potencaj agresantoj estas paperaj tigroj, kiuj povas esti venkitaj, kiom ajn da aviadiloj kaj kanonoj kaj kiajn ajn modernajn armilojn ili posedas.

Per siaj grandaj venkoj en la nacisava milito kontraŭ la usona agreso, la vjetnama popolo ne nur frakasis la agresan planon de la usona imperiismo

kaj perturbis ĝiajn kontraŭrevoluciajn tutterglobajn strategiajn dispoziciojn, sed ankaŭ multe retenis kaj reduktis ĝiajn agresajn fortojn, akcelis la batalon de la usona popolo kontraŭ la reakcia regado de la usona imperiismo, kaj tiamaniere faris grandegajn kontribuojn al la batalo de la tutmondaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo kaj donis brillan ekzemplon por la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj en ilia batalo por liberiĝo.

Je la fino de sia parolado, kamarado Jaŭ Venjuan diris emfaze: La ĉina kaj vjetnama popoloj estas fratoj kaj kunbatalantoj kiuj dividas inter si ĝojon kaj malĝojon kaj malfacilojn kaj danĝerojn. Tradicia batala amikeco ekzistas inter niaj du popoloj. Nia amikeco estas formita en la longa batalo kontraŭ la komuna malamiko kaj estas nerompebla kaj provita en furiozaj ŝtormoj. La grandaj venkoj de la tri popoloj de Hindoĉinio en la nacisava milito kontraŭ la usona agreso estas granda kuraĝigo kaj forta subteno al la ĉina popolo. Kaj sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo firme subtenas la vjetnaman popolon kaj la tri popolojn de Hindoĉinio en ilia nacisava milito kontraŭ la usona agreso. La vjetnama popolo decideme batalos ĝis la fino, kaj ankaŭ la ĉina popolo decideme subtenos ĝin ĝis la fino. Tiu ĉi nia starpunkto estas firma kaj neŝancelebla.




Respondante per praktikaj agoj al la batala alvoko farita de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko en la Deklaro publikigita je la 13-a de decembro, la ĉina popolo nun **“tenas la revolucion, stimulas la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito”** kaj disvolvas la spiriton de proletara internaciismo por decideme fari siajn plej grandajn kontribuojn en subteno al la vjetnama popolo kaj ĉiuj tri popoloj de Hindoĉinio en ilia nacisava milito kontraŭ la usona agreso. La frataj popoloj de Vjetnamio kaj ĉiuj tri landoj en Hindoĉinio povas esti certaj, ke la ĉina popolo ĉiam staros ĉe via flanko, kaj unuiĝos, batalos kaj venkos kune kun vi, kiaj ajn tempestoj kaj ondegoj eble leviĝos estonte en la batalo.

Tuj poste, la delegacia estro Dang Tran Thi faris paroladon plenan de entuziasmo. En la parolado li prezentis la brilan vojon de bataloj kaj venkoj trairitan de la sudvjetnama popolo en la pasintaj dek jaroj sub la gvido de la Naciliberiga Fronto kaj retrorigardis la longtempan revolucionan amikecon de interhelpo kaj reciproka kuraĝigo inter la vjetnama kaj ĉina popoloj en bataloj. Lia parolado plene esprimis la profundan amikan senton, kiun havas la sudvjetnama popolo por la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ, lia in-

tima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ, la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina registaro kaj la ĉina popolo.

Li diris, ke la sudvjetnama popolo akiris grandajn kaj ĉiufankajn venkojn en la pasintaj dek jaroj dank' al tio, ke la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio havas ĝustajn politikan kaj militan liniojn. Tiuj venkoj estas venkoj de la granda nacia unuiĝo de la heroa vjetnama popolo, kaj venkoj de ĝia profunda kaj arda patriotismo, ĝisosta malamiko kontraŭ la malamiko, nobla sindona spirito, firma volo de decido batali kaj venki kaj kreaĵ kapabloj.

La venkoj de nia popolo de suda Vjetnamio estas nedisigeblaj de la gigantaj helpoj donitaj de niaj dudek milionoj da sangaj gefratoj en la nordo kaj iliaj brilaj atingoj en produkto kaj bataloj. Ili estas ankaŭ venkoj de la nerompebla batala unuiĝo formita de la tri popoloj de Hindoĉinio en la batalo kontraŭ la komuna malamiko, la usonaj imperismaj agresantoj. Li diris, ke retrorigardante la brilan vojon de batalo kaj venkoj trairitan de la sudvjetnama popolo en la pasintaj dek jaroj sub la gvido de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio, ni neniam forgesos la gigantajn helpojn al ni donitajn de la estimata Prezidanto Maŭ, la Komunista Partio de Ĉinio kaj la sepcentmiliono ĉina




*Dang Tran Thi, la delegacia estro, faras paroladon en la kunveno.*



frata popolo. En la longa revolucia batalo, la popoloj de niaj du landoj ĉiam staras solidare ŝultron ĉe ŝultro, kune dividas inter ni malfacilojn kaj danĝerojn kaj starigis noblan amikecon, ĝuste kiel nia estimata Prezidanto Ho Chi Minh ofte diris: **“Inter Vjetnamio kaj Ĉinio ja profundas l’ amikeco: samideaneco plus frateco.”**

En sia batalo, la tuta vjetnama popolo kaj la popolo de la suda parto de Vjetnamio ĉiam ricevas ĉiufankajn kaj grandegajn kuraĝigojn kaj subtenojn de la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina registaro kaj la frata ĉina popolo. La sudvjetnama popolo ĉiam tenas profunde en sia koro la vortojn de profunda amikeco de Prezidanto Maŭ: **“La frata sudvjetnama popolo kaj la tuta frata vjetnama popolo povas esti certaj, ke la batalo via estas ankaŭ nia. La sepcentmiliona ĉina popolo estas potenca apogilo por la vjetnama popolo, kaj la vasta teritorio de Ĉinio estas ilia fidinda postfronto.”** Kiam la usona imperiismo sendis grandnombrajn aldonajn trupojn en sudan Vjetnamion kaj furioze bombadis la nordan Vjetnamion, la ĉinaj popolanoj en nombro de deko da milionoj iris sur stratojn por fari manifestaciojn, kondamnante la agresajn agojn de la usona imperiismo kaj esprimante sian decidemon subteni la batalon de la vjetnama popolo. Kiam la usona imperiismo etendis sian agresan militon al Kam-

boĝo, Prezidanto Maŭ publikigis la solenan deklaron: **“Popoloj de la Tuta Mondo, Unuiĝu kaj Venku la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn!”** Kiam nia popolo en la centra regiono de la meza parto trafis inundan katastrofon, la ĉinaj registaro kaj popolo dividis al niaj samlandanoj sian manĝaĵon kaj vestojn. Antaŭ nelonge, kiam la usonaj piratoj sendis aviadilojn por bombi kaj maŝinpafi dense loĝatajn areojn de norda Vjetnamio kaj faris barbaran militan ĉantaĝon kontraŭ la Vjetnama Demokratia Respubliko, la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina registaro publikigis deklaron por subteni la apelacion publikigitan de la Labora Partio de Vjetnamio kaj la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, je la 10-a de decembro 1970, severe kondamni la senskrupulajn aventurajn agadojn de la usona imperiismo kaj esprimi la firman starpunkton de la ĉina popolo plene subteni la energiajn klopodojn de la vjetnama popolo por konduki sian nacisavan batalon kontraŭ la usona agreso ĝis atingo de fina venko. Tiu deklaro ankaŭ esprimis subtenon al la Dekpunkta Plena Solvo kaj la Ok Suplementajn Punktojn elmetitajn de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio. La gratula telegramo sendita de Prezidanto Maŭ, Vicprezidanto Lin Biaŭ kaj



Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj al Prezidanto Nguyen Huu Tho kaj Prezidanto Huynh Tan Phat okaze de la deka datreveno de la fondiĝo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio certigis denove: “La sepcentmilionia ĉina popolo firme staros kune kun vi kaj tuforte vin subtenos ĝis akiro de la kompleta venko de la nacistava milito kontraŭ la usona agreso, kiajn ajn malfacilojn kaj danĝerojn la popoloj de Hindoĉinio renkontos survoje dum sia antaŭeniĝo en la nacistava milito kontraŭ la usona agreso kaj kiajn ajn frenezajn militajn aventurojn la usonaj agresantoj alprenos.”

Li diris: Veninte de la fronto por viziti la postfronton, ni tre ĝoje vidas propraokule la grandajn sukcesojn atingitajn de la ĉina popolo en la afero de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, en plifortigo de nacidefendo kaj en la Granda Proletara Kultura Revolucio.

De 21 jaroj, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio estrata de la estimata kaj amata Prezidanto Maŭ, peneme luktante en malfaciloj, sin apogante sur la propraj fortoj kaj senĉese disvolvante la kremen spiriton kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi, la ĉina popolo turnis la malriĉan kaj postrestintan duonfeŭdan kaj duonkolonian Ĉinion en potencon socialisman landon kun moderna industrio, progresinta agrikulturo, potenca nacidefendo kaj avangardaj scienco kaj tekniko. La mirakloj kreitaj de Ĉinio en la disvolvo de atoma, nuklea kaj spaca sciencoj estas admirataj de la tuta mondo. La sudvjetnama popolo esprimas varmajn gratulojn pro tiuj brilaj atingoj kaj rigardas la venkojn de la frata ĉina popolo kiel siajn.

Ni kredas, ke sub la brilo de Maŭzedongpenso, la laborema kaj kuraĝa sepcentmilionia ĉina popolo daŭre disvolvos la spiriton timi nek malfacilojn nek penadojn nek morton, kaj certe bonege plenumos ĉiujn batalajn taskojn elmetitajn de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, sukcese plenumos la Kvaran Kvinjaran Planon, atingos novajn sukcesojn kaj faros ankoraŭ pli grandajn kontribuojn por la afero de la revolucia batalo de la mondaj popoloj kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj nova koloniismo estrataj de la usona imperiismo.

En la fino de sia parolado, la delegacia estro Dang Tran Thi diris emfaze: Ni sudvjetnama popolo arde amas pacon, sed ĝi devas esti paco kun vera sendependeco kaj libereco. Se nur la usona imperiismo ne rezignos sian agresan ambicion, la sudvjetnama popolo daŭre batalos.

La estimata kaj amata granda gvidanto de nia vjetnama nacio Prezidanto Ho Chi Minh diris:

**“Bomboj absolute ne povas teruri niajn samlandanojn, nek ruzaj vortoj povas trompi nin. Ni vjetnama popolo decideme batalos ĝis ĉiu usona agresanto foriĝos de sur nia amata lando.”**

Por efektivi la sanktan testamenton de Prezidanto Ho, la armeo kaj popolo de suda Vjetnamio nun aktive respondas al la alvoko de la Centra Komitato de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio farita en respondo al la alvoko de la Labora Partio de Vjetnamio kaj la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, decideme persistante daŭrigi kaj energie akceli la rezistan militon por frakasi ĉiujn intrigojn de la usona imperiismo por intensigi la militon. Se la usona imperiismo nur ektuŝos nordan Vjetnamion, ni armeo kaj popolo de suda Vjetnamio donos al ĝi punon kvin- kaj eĉ dek-oble pli severan. La armeo kaj popolo de suda Vjetnamio decideme frakosas la politikon de la usona imperiismo “vjetnamigi” la militon, batalos plue ĝis kompleta retiriĝo de la usonaj trupoj kaj ĝis disfalo de la pupaj trupoj kaj pupa reĝimo, liberigos la sudon, defendos la nordon por tiel reunuigi plie la patrolandon.

La popolo en la sudo firme decidis kune kun la fratoj de la tuta lando, batali ŝultron ĉe ŝultro kun la frataj popoloj de Kamboĝo kaj Laoso por forpeli la usonan imperiismon el Hindoĉinio.

Sub la ĉiamvenka flago de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj kun la simpatio kaj subteno de niaj amikoj el la kvin kontinentoj, la sudvjetnama popolo kredas ke ĝi certe akiros kompletan venkon.

La paroladoj de kamarado Jaŭ Venjuan kaj la delegacia estro Dang Tran Thi de tempo al tempo vekis tondrajn manklakadojn en la kunvenejo.

En la nomo de la kunveno, Vu De, vicestro de la Pekina Revolucia Komitato, kaj Ding Hilin, vicprezidanto de la Asocio de la Ĉina Popolo por Amikeco kun Fremdaj Landoj, donacis silkan flagon al la sudvjetnama delegacio. En la nomo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio, la delegacia estro Dang Tran Thi donacis silkan flagon al la kunveno. La silka flago donacita de la kunveno al la vjetnamaj kunbatalantoj portas jenan surskribon: “La popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio ĉiam unuiĝos kune, batalos kune kaj venkos kune!” La silka flago donacita de la vjetnamaj kunbatalantoj al la kunveno portas jenan surskribon: “Unuiĝo, batalo, venko.”

La kunveno finiĝis en entuziasma kriado de sloĝanoj kaj majesta muziko de la *Internacio*.





*Dang Hai Van, vicesstro de la Delegacio de la Centra Komitato de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio, faras raporton en la kunveno por celebri la 10-an datrevenon de la fondiĝo de la fronto, okazigita de la Nacidefenda Ministerio de nia lando.*



# La Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio

**L**A Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio fondiĝis en la 20-a de decembro 1960. La prezidanto de la prezidantaro de ĝia centra komitato estas Nguyen Huu Tho, kaj ĝiaj vicprezidantoj estas Ybi Aleo, Vu Chi Cong, Phung Van Cung, Datie Thom Me The Nhem, Huynh Tan Phar (samtempe prenanta la oficon de ĝia ĝenerala sekretario) kaj Tran Nam Trung.

Al ĝi aliĝis la Popol-revolucia Partio de Vjetnamio kaj aliaj pli ol dudek politikaj partioj, amasaj kaj religiaj organizaĵoj.

La agadprogramo de la Naciliberiga Fronto konsistas el jenaj 10 punktoj:

1. Renversi la kamuflitan kolonian reĝimon de la usonaj imperiistoj kaj la diktaturon de iliaj lakeoj, starigi la nacian kaj demokratian koalician registaron.

2. Starigi progreseman reĝimon de larĝa demokratio.

3. Konstrui sendependan kaj suverenan ekonomion kaj plibonigi la vivkondiĉojn de la popolo.

4. Redukti la farmoprezon, alpaŝi al la solvo de la agrara problemo, redonante la teron al tiuj, kiuj ĝin prilaboras.

5. Konstrui naciajn kaj progreseman kulturon kaj edukadon.

6. Konstrui armeon por defendi la patrujon kaj protekti la popolon.

7. Realigi la egalrajtecon inter naciecoj kaj inter ambaŭ seksoj, kaj protekti la legitimajn rajtojn de alilandanoj rezidantaj en Vjetnamio kaj de la vjetnamoj rezidantaj en alilandoj.

8. Apliki eksterlandan politikon pacan kaj neŭtralan.

9. Restarigi la normalajn rila-

tojn inter la nordo kaj sudo, kaj alpaŝi al la paca reunuiĝo de la patrujo.

10. Lukti kontraŭ la agresmilito kaj aktive defendi la mondpacon.

La Politika Programo de la Naciliberiga Fronto aprobita de la Eksterordinara Kongreso okazigita en aŭgusto 1967 montras: "La plej danĝeraj malamikoj de nia popolo en la nuna tempo estas la usonaj imperiistoj kaj la naciperfida pupa regpotenco." "La nuntempaj tasko kaj celoj de la naciŝava batalo de la sudvjetnama popolo estas: unuigi la tutan popolon, firmdecide batali por fiaskigi la usonan agresmiliton, renversi la pupan regpotencon salajratan de Usono, starigi regpotencon de vasta nacia kaj demokratia unuiĝo, konstrui sudan Vjetnamion sendependan, demokratian, pacan, neŭtralan kaj prosperan, kaj alpaŝi al la paca reunuiĝo de la patrujo."



# Batalaj Agloj Nevenkeblaj

**E**N Vjetnamio vaste cirkulas rakontoj pri bravaj vojoj de la batalaj herooj de la aerarmeo Luu Huy Trieu kaj Le Hai.

Iufoje, sur aerodromo montrante la unuan el la aviadiloj fulmrapide transflugantaj super ni, la batala heroo Luu Huy Trieu diris: "Jen aviadilo stirata de vicestro de la aera floto kamarado Le Hai. Nun, ĉiutage ni estas pretaj ĉiam ajn plenumi batalan taskon por ekstermi usonajn piratajn aviadilojn." Ĵetinte rigardon al la flugantaj aviadiloj, la eminenta estro de la aera floto daŭrigis: "Ili estas en flugado, ni do daŭrigu rakontojn pri bataloj!"

## "HEJMLOKO, VIN MI VIDAS EN BATALO"

Je la 17-a de aprilo 1966, la aviadila grupo de Luu Huy Trieu ricevis batalan ordonon kaj ĝiaj 4 aviadiloj tuj ekflugis al batalo. Ili rapide atingis la batalan areon. Sed pro tro multaj nuboj ili ne trovis la celaĵon post 3 sinsekvaj traserĉoj. Tiam ili supozis ke la celaĵo eble estas malrapida. En la 4-a traserĉo Luu Huy Trieu mallevis sian akompanan aviadilon ĝis certa alteco, rigardis supren demalsupre kaj trovis unu usonan transportan aviadilon C-47. La malamika aviadilo tiam jam estis tre proksime de tiu de Luu Huy Trieu. Reduktante la rapidecon de sia aviadilo, li samtempe faris raporton al la surtera komandanto kaj la grupestro. Tiu lasta tuj donis batalan ordonon: "Nepre ekstermu la malamikan aviadilon!" Ricevinte la ordonon Luu Huy Trieu ekkanonis al la malamika aviadilo. La unuaj kugloj flugis iom malalte kaj ne trafis. Tre aplombe kaj rapide li tiris la stirstangon per unu mano por movi sian aviadilon al pli oportuna alteco kaj per la alia mano daŭrigis pafon al la malamika aviadilo. "Trafite! Ekbrulas la malamika aviadilo!" Li kriis nereteneble. En tiu tempo ankaŭ la aliaj tri aviadiloj pafis salvojn da kugloj. La malamika aviadilo estis rompita en du partojn, kiuj fariĝis du fajrobuloj kaj falis teren. Poste oni konstatis, ke la malamika aviadilo estis transportanta spionojn al la nordo de Vjetnamio por fari surteran sub-

fosadon, sed ĝi ne eskapis el la puno de la vjetnama popolo. La 4 aviadistoj kaj 12 spionoj en ĝi ĉiuj cindriĝis.

Post faligo de la malamika aviadilo, Luu Huy Trieu atente rigardis la teron: Ho! Li ja batalas super sia hejmloko. Kiel konataj kaj intimaj estas la akvoj kaj montoj sur la tero! Jen tie estas lia vilaĝo, en kiu estas lia laborema patrino; jen tie estas monta deklivo, sur kiu li paŝtis bubalon en la infana aĝo. Li pensis en si emocie: "Hejmloko, vin mi vidas en batalo! Mi nepre pli forte punos la usonajn aerobanditojn por defendi la hejmlokon kaj patrolandon." Li tuj precize raportis al la surtera komandejo la lokon kie falis la malamika aviadilo.

Kiam la batala fumo ankoraŭ ne malaperis sur la ĉielo, Luu Huy Trieu kaj liaj kamaradoj jam revenis al la bazo en venka ĝojo stirante la batalajn aglojn.

## FORTE BATI LA USONAJN AEROBANDITOJN

Parolante pri kamarado Le Hai, Luu Huy Trieu ĝoje diris al ni: "Post alveno al ni, kamarado Le Hai longdaŭre stiris la akompanan aviadilon en eskorto al mia estra aviadilo kaj ni bone kunagis en la batalo. En la aera batalo oni nepre devas disvolvi kolektivismon, nur kio povas garantii fortan baton al la usonaj agresantoj kaj faron de novaj kontribuoj."

La praktiko de bataloj montris, ke tiuj du aviadistoj estas brava grupeto strikte unuiginta kaj kunaganta. Kiel Luu Huy Trieu sturmis, ĉiam tiel sekvis lin strikte Le Hai. Ili ŝirmis, subtenis kaj helpis unu la alian, kaj montris sin nevenkeblaj antaŭ aviadiloj de la usonaj agresantoj.

Iutage en aprilo 1967, por defendi la ĉefurbon Hanojon, ili sturme flugis ĉielen kaj faris intensan batalon kontraŭ multaj usonaj aviadiloj. Tiutage videbleco estis ne tre bona pro la maldensa nubo, sed la juna Le Hai batalis ĉiam pli brave. Antaŭ pli ol 10 jaroj, tiu junulo kies hejmloko estas en la

sudo de Vjetnamio venis por kolektiĝi en la nordo kune kun sia patro en trupo rezistanta kontraŭ la franca imperiismo. Tiam li estis nur dekjara kaj lia pli juna frato en la sudo nun jam estas batalanto de la Sudvjetnama Liberiga Armeo. Ĉiufoje, kiam li ekpensas la damnindajn krimojn de la usona imperiismo faritajn en la sudo, li ne povas bridi sian indignon. Nun la usonaj aerobanditoj entrudiĝas en la nordon por fari barbaraĵojn, kio estas absolute netolerebla. “Nepre brave ekstermu la usonajn agresantojn!” Jen lia decido. En tiutaga batalo, post kiam Luu Huy Trieu eniris en la batalan areon kun Le Hai sub sia gvido, li intence lasis Le Hai agi kiel ĉefa atakanto kaj helpis kaj ŝirmis lin en la batalo. Finfine li kreis al Le Hai favorajn kondiĉojn por atako. Le Hai sin direktis al unu usona aviadilo F-105, kun malamo al la usona imperiismo li ekpemis la elektran prembutonon, kugloj flugis unu post alia al la malamika aviadilo, kiu tuj ekflamis kaj eksplodis. Tio estis la unua batala merito kreita de Le Hai en faligo de usonaj aviadiloj kaj ankaŭ triumfa kanto de revolucia kolektivismo de ilia grupo verkita en la aero de la patrolando.

### KUNA Batalo kaj Kuna Venko

Dum sia kreskado en batalo, la du aviadistoj neniam forgesis ke estas la estimata Prezidanto Ho kiu havigis al ili konscion rezisti la usonan agreson kaj defendi la patrolandon. La intima aŭdienco de Prezidanto Ho al aerarmeaj batalantoj kaj liaj instruoj stimulas ilin brave bati la usonajn aerobanditojn kaj donis al ili neelĉerpeblan forton. Iun tagon de junio 1968, por defendi la provincon Nghe An — la hejmlokon de Prezidanto Ho, ili tie faris intensan batalon kontraŭ malamikaj aviadiloj kaj akiris brilan venkon.

Estis varmega somertago, ili atendis ordonon de ekflugo sidante en la stirejoj. Alvenis la batala tempo, ili rapide flugis al la ĉielo, sed en tiu tago estis tro dikaj nuboj kiuj malhelpis la vidon. Ili aplikis interkonsentitan rimedon por rapide kontaktiĝi unu kun la alia kaj eviti atenton de la malamikoj. Le Hai rapide trovis ke 4 malamikaj aviadiloj alflugas de la maro. Luu Huy Trieu tuj donis al Le Hai atakan ordonon kaj mem estis preta lin ŝirmi. La malamikaj aviadiloj intencis eskapi atakon de Le Hai kaj ruze dividis sin en du grupetojn por ĉirkaŭflugi post la aviadilon de Luu Huy Trieu kun la vana espero antaŭe okupi la pozicion por atako. Sed la intrigo estis tuj travidita de la du bravaj kaj sagacaj vjetnamaj aviadistoj. Komandate de Luu Huy Trieu, per pli rapida manovro Le Hai



*Batala heroo kamarado Le Hai*

sturmis la malamikajn aviadilojn kaj faris furiozan pafadon, unu malamika aviadilo estis trafita kaj eksplodis de brulo kaj ĝiaj fragmentoj falis eĉ sur la aviadilon de Luu Huy Trieu. En tiu tempo Luu Huy Trieu rimarkis ke iu malamika aviadilo intencas ŝtele ataki lin, per abrupta manovro li sturmis la malamikan aviadilon. La lasta haste manovris por eskapi, je tiu momento Luu Huy Trieu ekpafadis kaj la malamika aviadilo ekflamis kaj falis. Vidinte la falon de siaj kunuloj, la aliaj du usonaj aviadiloj haste forfuĝis al la maro per ultramalalta flugo.

Tiel kun la firma decido batali kaj venki, Luu Huy Trieu kaj Le Hai foje kaj refoje venkis usonajn aerobanditojn. Luu Huy Trieu jam paffaligis 6 usonajn aviadilojn de diversaj specoj kaj Le Hai 5. Ili kune batalas kaj kune venkas en la batalo kontraŭ la usonaj aerobanditoj.

Dum la adiaŭo, kamaradoj Luu Huy Trieu kaj Le Hai esprimis al ni sian decidon: Ankoraŭ daŭras la batalo kontraŭusona kaj nacisava, ni devas ĉiam ajn akriĝi nian singardemon por ekstermi la entrudiĝantajn malamikojn.



# Heroaj Virinoj Vjetnamaj

**D**UM nia vizitado en Vjetnamio, ni vidis multajn heroinojn kaj aŭdis multon pri iliaj admirindaj faroj. Multe nin emociis la firma kontraŭusona spirito, kiun la revoluciaj vjetnamaj virinoj montris.

## MATURIĜO EN HARDADO DE MILITAJ FAJROJ

Tuj post ĉeso de torenta pluvego, la maro frapadis per ondoj la bordon. Sur la borda posteno virina bateria roto de la vilaĝo N en Quang Binh estis batalpreta en ĉiu momento kun vigla singardemo observi, ĉu aperas iaj rabistaj militŝipoj de la usona imperiismo. Ni vizitis la vilaĝon ĝuste en la dua tago post kiam ĝi ricevis la titolon de heroa roto.

La tuta fiŝista vilaĝo estis en ĝojego de venko. Sed en tiu tempo, la politika direktanto de la roto Ngo Thi Chien estis okupata de la penso, kiel bati ankoraŭ pli peze la usonajn agresantojn. Post sia fondiĝo la roto jam multfoje faris la maran batalon kaj per kanonoj grave difektis la militŝipojn de la usona imperiismo. Tamen, Ngo Thi Chien diris: "Kompare kun niaj heroaj fratinoj en la sudo kaj kun kamaradino Tran Thi Ly, ni faris ankoraŭ tro malmulte. Ni devas multe lerni de la fratinoj en la sudo kaj de la heroino Tran Thi Ly." Ŝi cetere rakontis kun entuziasmo: "Post sia ricevo de la titolo de heroino, kamaradino Tran Thi Ly vizitis nian lokon kaj multon rakontis al ni. Poste ŝi eĉ skribis al ni por nin helpi kaj kuragi!"

*La virina bateria roto de la vilaĝo N en Quang Binh serioze difektis militajn ŝipojn de la usonaj agresantoj.*



Tran Thi Ly estas heroino en antaŭurbo de Dong Hoi. Ŝi havis malpli ol 18 jarojn, kiam eksplodis la nacisava milito kontraŭ la usona agreso. Kiam komenciĝis la batalo kontraŭ aeraj atakoj, ŝi prenis sur sin la taskon de interkomunikado kiel kuriero en la vilaĝo. Ŝi multfoje portis kartoĉojn kaj trinkaĵojn al batalpostenoj kaj per boato transportis batalantojn trans riveron spite al la bombado de malamikaj aeroplanoj. En la intensaj bataloj brilis ŝia revolucia konscio kaj braveco, kaj la loka organizaĵo de la Labora Partio de Vjetnamio akceptis ŝin antaŭtempe kiel regulan membron sur batalposteno, kiam mankis al ŝi ankoraŭ 3 monatoj por esti 18-jara. Post aliĝo al la Partio ŝi montris sin ankoraŭ pli elstara en laboro, ĉu en marborda patrolado kaj en batalo kontraŭ aeratako aŭ en servado al la batalfronto. Foje dum batalo, la teraĵo levita de malamika bombo plene ŝin kovris, tamen en sveno ŝi ankoraŭ forte premis al si la pafilon por ke ĝi ne difektiĝu. Kiam oni parolis pri tio kun ŝi, ŝi diris: "Prefere oferi mian vivon ol difekti la armilon. Se nur la armilo restas perfekta, aliaj kamaradoj povas ekpreni ĝin por daŭre batali kontraŭ la usonaj piratoj!" Tran Thi Ly estas nun respondeculo de la milico de la urbo Dong Hoi. Nun la virina bateria roto de la Vilaĝo N fariĝis heroa trupunujo. Kiel ĝia intima batalamiko, kiom ĝoja devas esti Tran Thi Ly sciiginte pri tio. Kaj ili ja progresas kune en la milito unu kuraĝigante la alian!

## ĈIAM BATALI KONTRAŬ USONO POR SAVI LA PATROLANDON DUM LA TUTA VIVO

En la vilaĝo Bao Ninh ĉe la rivero Nhat Le vivis heroino onklino Suet. Ŝi estis lerta remisto. Por subteni la batalantojn en punado al la usonaj aeraj rabistoj, malgraŭ sia maljuneco ŝi portis per boato municion, manĝaĵon kaj batalantojn trans la riveron, timante nek bombadon nek pafadon de malamikaj aeroplanoj. Ifoje, ŝi ire-reire remis trans la riveron pli ol 40 fojojn en unu tago. Ŝi fariĝis modelo de maljuna generacio de vjetnamaj virinoj en kuraĝa servado al la nacisava milito kontraŭ la usona agreso.

Sed, iutage en aŭgusto de 1968, okazis akcidento konsterna por la vilaĝanoj kaj batalantoj. En tiu tago onklino Suet ĵus reakiris sian sanon kaj jam rapidis al sia batalposteno ĉe la pramejo por ne perdi tempon. Malfeliĉe la heroa onklino renkontis ĉe la riverbordo grandan nombron da bomboj faligitaj de malamikaj aeroplanoj kaj oferis sian vivon en la aĝo de 60 jaroj. Ĝis la lasta momento de sia vivo onklino Suet neniam forgesis la aferon por venki la usonajn agresantojn kaj kuraĝigis aliajn daŭre batali per sia heroa ekzemplo.

Kiam ni venis al ŝia hejmvilaĝo, ni trovis ke aperis tie pli da virinoj similaj al onklino Suet, ekzemple bofratino Khau, kiu estas modelo ĉiam stimulantanta sin per la spirito de onklino Suet por brave batali.

*La 404-a Virina Memdefenda Taĉmento de la Brigado por Komuniko kaj Memdefendo de Ha Tinh, kiu brave batalante garantiis la senĉesan trafikadon de la vojoj kaj kunagis kun frataj unuoj en faligo de 10 aviadiloj de la malamiko, gajnis la gloran titolon Heroa Unuo de la Popolaj Armitaj Fortoj.*







*Milicanino*

Dum la milito ŝi venkis multajn malfacilojn por organizi virinojn fiŝkapti sur la maro persistante pri produktado dum batalo kaj montrante sin elstara reprezentanto de la virinoj de la fiŝista vilaĝo. Por venki la usonajn agresantojn, ŝi kaptis kun aliaj virinoj ŝipojn post ŝipoj da fiŝoj sur la furioza maro sub bombado kaj pafado de malamikaj aeroplanoj. Per agoj ŝi elmontris siajn bonajn virtojn posedendajn de kompartiano. Iutage la viraj kaj virinaj fiŝkaptaj taĉmentoj de la vilaĝo denove renkontis la atakon de malamikaj aeroplanoj. Bofratino Khau rapidigis aliajn virinojn dise sinkaŝi kaj mem restis sur la ŝipo por observado spite al danĝero. Kiam la malamikaj aeroplanoj forflugis, ŝi rimarkis ke malproksime sur la ondoj ligna ŝipo balanciĝas sendirekte ŝajne difektita. Ŝi rapide kunvokis la virinojn por savi la ŝipon en spirito de kolektivismo. Kiam ili alproksimiĝis, ili trovis ke ĝi estas ŝipo de la fiŝkaptista grupo, al kiu apartenas la edzo de bofratino Khau. Preskaŭ ĉiuj kooperativanoj sur ĝi estis grave vunditaj. Ŝi diris al sia edzo: “Ĉar vi vundiĝis malpli grave,

Mau, do atendu momenton!” Tiel ŝi kaj ŝiaj kamaradinoj unue forportis la gravevunditojn. Kiam ŝi venis al sia hejmo, ŝi trovis ke ankaŭ ŝia patrino estas vundita de bombo de la usonaj aeraj rabistoj. Sed ŝi donis grandan zorgon antaŭ ĉio al aranĝo de la vivo de la aliaj kooperativanoj por kuraĝigi ilin. Poste ŝia edzo oferis sian vivon dum plenumo de iu tasko, kaj malgraŭ tio ŝi firme batalis daŭre en la unuaj vicoj kontraŭ la usonaj agresantoj por savi la nacion.

### KURAĜE PRENI SUR SIN PEZAJN TASKOJN

En Quang Binh ni renkontis rotestrion de junula sturma taĉmento. Ŝi estas 23-jara vilaĝa knabino nomata Hien. En majo de 1969, responde al la alvoko de Prezidanto Ho Chi Minh kaj la Labora Partio de Vjetnamio, ŝi decideme forlasis sian hejmlokon Nghe An kaj iris al la plejfronto de naciŝava milito kontraŭ la usona agreso. Laborante en la junula sturma taĉmento ŝi faras ĉion la unua kaj meminiciate prenas sur sin la plej pezan taskon, ludante la ekzemplodonan rolon de membro de la Labora Partio de Vjetnamio. Ŝi ofte diras: Ni devas ĉiam memori ke ni devas esti indaj gefiloj de la naskiĝloko de onklo Ho kaj idoj de la soveta Nghe Tinh. Kiam la sturma taĉmento plenumis la taskon de transportado, ŝi gvidis la taĉmentanojn por venki diversajn malfacilojn en transpaso de montoj kaj riveroj sub la bombado kaj pafado de malamikaj aeroplanoj, sukcese portante fojoj post fojoj provizaĵojn al destinita loko.

En septembro de 1969, malfeliĉe forpasis la granda gvidanto de la vjetnama popolo Ho Chi Minh. Kiam la malĝojiga informo venis al la fronto, kun senkompara malĝojo ŝi ripetade lernis la testamenton de Prezidanto Ho, decidis turni sian doloron en revoluciajn agojn por kontribui en gajno de novaj venkoj en la naciŝava milito kontraŭ la usona agreso. Oni disvolvis ardan movadon de konkurso en la sturma taĉmento kaj la laborefiko kreskis preskaŭ per duoblo, krom ŝparo de grandnombraj elspezoj por la ŝtato. Iliaj brilaj atingoj estis multfoje laŭdataj de la supera instanco.

Kiam ni vizitis la sturman taĉmenton, ĝiaj membroj ĝuste plenumis la taskon de riparo de ŝoseo. Sub la arda suno ili laboris tre energie en ŝvito. El ilia fervoreco ni facile vidis la fidelan koron de la gejunuloj sindediĉantaj al la naciŝava afero kontraŭ la usona agreso. Kiam ni vidis sinsekvajn aŭtojn rapidantajn sur la de ili riparita vojo al la fronto, ni ne povis ne senti profundan estimon al Anh Hien kaj ŝiaj kamaradoj.

# La Rumana Tablotenisa Teamo

## Vizitis Ĉinion


Ili interŝanĝas la teamajn flagojn kun arda amikeco.







Vicĉefministro Li Hiannian, vicstabestro de la Ĝenerala Stabo de ĈPLA Li Zuopeng, ambasadoro Aurel Duma kaj lia edzino, teamestro Horvath Tiberiu k. a. fotiĝas kun la sportistoj post rigardo de la brila konkurso.




Brila amikeca konkurso inter sportistoj de la du landoj





Intima interparolo de ĉina kaj rumanaj sportistinoj.





La Rumana Tablotenisa Teamo gvidata de Horvath Tiberiu, prezidanto de la Rumana Tablotenisa Asocio, faris amikan viziton al Ĉinio de la 8-a ĝis la 17-a de decembro, 1970.

Dum la vizito al Ĉinio, la ĉinaj kaj rumanaj sportistoj formis inter si profundan amikecon. La sportistoj de ambaŭ landoj rigardis la konkursejon kiel lokon por plifortigi la amikecon inter la du popoloj, kaj dum la konkurso la ambaŭflankaj sportistoj per sia nobla stilo profunde impresis la spektatorojn.

Dum sia vizitado, la Rumana Tablotenisa Teamo vizitis fabrikojn, kamparajn popolkomunumojn, pejzaĝojn kaj antikvajn vidindaĵojn.

La amika vizito de la Rumana Tablotenisa Teamo al Ĉinio pliapaŝe fortigis la revolucion amikecon kaj unuigon inter la popoloj kaj sportistoj de Ĉinio kaj Rumanio.

Foto de la ambaŭlandaj sportistoj farita dum ilia vizito de la Somera Palaco de Pekino





La Rumana Tablotenisa Teamo vizitas fabrikon.


La sportistoj de la du landoj kune vizitas la Popolan Komunumon de Amikeco inter Ĉinio kaj Rumanio.







La sportistoj vizitas la Grandan Muron de nia lando.



*Niaj sportistoj (maldekstre) en la 13-a Skandinavia Internacia Ĉampioneca Konkurso*

## Vizito de Nia Tablotenisa Teamo

### Eksterlande

**S**UB la gvido de Ĝaŭ Hivu kaj Pan Ĝigang, la Ĉina Tablotenisa Teamo vizitis Rumanion, Svedion, Danlandon, Jugoslavion kaj Albanion dum la periodo de la 11-a de novembro 1970 ĝis la 8-a de januaro de la kuranta jaro.


Tiu teamo konsistis el 15 sportistoj, el kiuj la viraj estis Ĝuang Zedong, Li Fujung, Ĝang Hielin, Ĝoŭ Lansun, Li Gingguang, Ju Ĉangĉun, Ĉi Enting kaj Vang Venhua, kaj la virinaj estis Lin Hujking, Ĝeng Mingi, Li Li, Liang Liĝen, Li Henan, Ĝeng Huajjing kaj Ĝang Li. La trejnisto de la vira grupo estis Hju Jinŝeng kaj tiu de la virina grupo estis Vang Ĝiliang.

Dum sia vizitado al Rumanio, Svedio, Danlando kaj Jugoslavio, la Ĉina Tablotenisa Teamo faris

amikajn maĉojn kun la tablotenisaj teamoj de la respektivaj landoj kaj dum sia vizito al Albanio faris amikajn prezentajn ludojn kun ĝia tablotenisa teamo. Per tiuj aktivadoj, la Ĉina Tablotenisa Teamo pliprofundigis la amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj tiuj landoj kaj inter iliaj sportistoj. Dum sia vizitado, la ĉinaj tablotenisaj sportistoj interŝanĝis spertojn kun la fremdlandaj gekolegoj kaj lernis multon de ili.

Dum sia amika vizito al Svedio, la Ĉina Tablotenisa Teamo partoprenis la Skandinavian Liberan Ĉampionecan Konkurson de Tabloteniso de la 26-a ĝis la 29-a de novembro en Halmstado en suda Svedio. En tiu konkurso, la ĉinaj sportistoj akiris relative grandan sukceson, nome ĝi gajnis la ĉam-





*Sportistoj de Ĉinio kaj Albanio faras brilan prezentadon por la laboristoj de la Aŭtoriparejo de Dures.*

pionecojn de virina teama maĉo, virina unuopa maĉo, virina duopa maĉo, vira duopa maĉo kaj miksita duopa maĉo.

La hungaraj kaj svedaj sportistoj gajnis respektive la ĉampionecon de vira teama maĉo kaj vira unuopa maĉo.

En Kopenhago, la Ĉina Tablotenisa Teamo faris du amikajn konkursojn de unuopa maĉo kun danlandaj kaj svedaj tablotenisistoj. 5 sportistoj kaj sportistinoj de Danlando kaj la tuta membraro de la ĉina teamo partoprenis la konkurson. Krome, ankaŭ 5 svedaj gesportistoj ĝin partoprenis laŭ invito.

En tiuj du maĉoj, escepte de tio, ke la sveda sportistino B. Radberg kaj la ĉina sportistino Ĝang Li gajnis la trian lokon, la ĉinaj vira kaj virina grupoj gajnis ĉiujn tri unuajn lokojn. La ĉina juna sportisto Vang Venhua venkis Hans Alser, la vira ĉampiono de Eŭropo kaj de la 13-a Skandinavia Internacia Ĉampionea Konkurso de Tabloteniso, en la unua serio de ludo je 2 kontraŭ 1 kaj Ĝang Li venkis la danlandan virinan ĉampionon B. Christensen je 2 kontraŭ nulo.

En Jugoslavio, la ĉina teamo faris amikajn maĉojn en ses urboj. Interalie, vespere de la 11-a de decembro, ĝi faris viran kaj virinan teamajn maĉojn kun la ŝtata tablotenisa teamo de Jugoslavio en la sporta halo de Novbelgrad kaj je la 12-a faris turniron de viroj kaj virinoj en la sporta halo de Novi Sad. En tiuj du maĉoj, la vira kaj virina grupoj de Ĉinio venkis la jugoslavan teamon respektive je 5 kontraŭ 2 kaj 5 kontraŭ 0 kaj 7 kontraŭ 1 kaj 7 kontraŭ 0. Dum la konkurso, la jugoslavaj rigardantoj varme manklakadis kaj akklamis la eminentan arton de la ĉinaj kaj jugoslavaj sportistoj.

Dum sia vizitado, la Ĉina Tablotenisa Teamo estis varme bonvenigata kaj amike akceptata de la popoloj de tiuj landoj.

Kiam la ĉina teamo atingis la svedan ĉefurbon Stokholmo, amikoj de la Sveda-Ĉina Ligo kune kun aliaj amikoj de la sporta kaj ĵurnalista rondoj de Svedio ĝin bonvenigis, alte tenante portretojn de Prezidanto Maŭ, naciajn flagojn de Svedio kaj Ĉinio kaj sloganon rubandegon kun la surskribo: "Vivu la amikeco inter la sveda kaj ĉina popoloj!"



*Komenciĝos la amika maĉo inter la ĉinaj kaj rumanaj sportistoj.*

Vespere de la 5-a de decembro 1970, la Sveda-Ĉina Ligo okazigis grandan vesperon kun la Ĉina Tablotenisista Teamo, kaj 1,300 svedaj kaj alilandaj amikoj ĝin ĉeestis. Kaj tiu vespero ĉiam estis plena de varma amika etoso.

Dum sia restado en Albanio, la ĉina teamo vizitis la urbojn Tiraneo, Durres, Berat kaj Gjirokaster, la hejmlokon de la granda gvidanto de la albana popolo Enver Hoxha. Ĉie la ĉinaj sportistoj ricevis varmegajn bonvenigojn kaj akceptadon de gvidantaj kamaradoj de la Partio, registaro kaj vastaj amasoj.

La ĉina kaj albana tablotenisistoj kune faris plurajn brilajn prezentajn ludojn kaj rikoltis varmajn bonvenigojn kaj laŭdojn de la spektatoroj. La reciprokaj prizorgo, lernado kaj kuraĝigo de la tablotenisistoj de la du landoj en la trejnado kaj prezentado vivece manifestis la sinceran revolucion amikecon kaj batalan unuiĝon de la popoloj kaj sportistoj de Ĉinio kaj Albanio.

*Niaj sportistoj vizitas fabrikan de Jugoslavio.*





# Plej Sonora Estas la Kanto

## “Ruĝas la Oriento”

**L**A kanto *Ruĝas la Oriento* estas plej bela himno al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

La kanto *Ruĝas la Oriento* naskiĝis antaŭ 29 jaroj, nome en 1942, kiam nia patrolando kaj nacio estis en tragika katastrofo. Tiutempe, post kapto de granda areo de nia teritorio, la japana imperiismo ŝanĝis sian kontraŭrevolucion taktikon: unuflanke, ĝi milite premis la kuomintangan reakciularon kaj aliflanke, politike logis ĝin al kapitulaco, dum ĝi koncentris siajn fortojn kontraŭ la liberigitajn regionojn kaj la Okavojan Armeon kaj la Novan Kvaran Armeon gvidatajn de la Komunista Partio de Ĉinio; kaj la kuomintanga reakciularo, anstataŭ batali kontraŭ la japanaj agresantoj, turnis siajn pafilojn kontraŭ la Komunistan Partion de Ĉinio. En tiu tempo tre arogantis la reakciuloj en- kaj ekster-landaj, kvazaŭ “nigraj nuboj subpremantaj detruos la urbmuojn”! Sed ni sukcesis pasigi la malfacilajn tagojn. En la ĉinaj liberigitaj regionoj sub la gvido de Prezidanto Maŭ, precipe en la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono, regis lumo, prospero kaj vivpleneco.

En sia brava kaj kontinua batalado, la proletaro kaj laboranta popolo de Ĉinio trovis sian plej grandan gvidanton Prezidanton Maŭ Zedong. Nur Prezidanto Maŭ estas la savanto de la popolo; nur la liberigitaj regionoj kreitaj de Prezidanto Maŭ signifis la estontecon de la lando. Kiom da revoluciaj sentimentoj de arda amo, kredo, adoro kaj fideleco al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ havis por esprimi la revolucia popolo en la liberigita Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono, kiu estis ĝojplena pro sia liberiĝo kaj mastriĝo!

En la vilaĝo Ĝanggiaĝuang de Giahian-gubernio, norda Ŝenhi, vivis malriĉa kamparano nomata Li Joŭjuan, kiu estis unu el la miloj kaj miloj da mas-

triĝintaj laborantaj popolanoj. Li, ŝafisto multe suferinta, vidis propraokule la gigantan ŝanĝon de la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono, persone spertis la mallumon kaj lumon de la du malsamaj socioj kaj ricevis radikalan ŝanĝon en sia spirita fizionomio. La sincera kaj arda sentimento kaj forta sento de liberigito kaŝita funde de lia koro inspiris lin verki revoluciajn kantojn pri Prezidanto Maŭ unu post alia.

En iu vintra mateno de 1942, Li Joŭjuan vivplene iris en la direkto de la urbo de Giahian-gubernio. Kiam li ascendis montodeklivon, subite ekheliĝis la fronto: la nokto solviĝis en la malhele blua firmamento, la ruĝa sundisko leviĝis malrapide en la oriento, ruĝigante lian vizaĝon kaj varmigante lian koron; la tero elspiris ebriigan bonodoron, birdaroj dorme ripozintaj en la valoj flugis renkonte al la matena suno... La bunta vivo kaj profundaj sentimentoj vekis en li riĉan asocion de ideoj kaj iu brila ideo ekpulis en lia menso: Ĉu nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ ne ĝuste similas al la leviganta suno, kiu forpelas la mallumon kaj demonojn, havigas al la popolo la rajton de vivado kaj montras eliran vojon al Ĉinio? Jes, Prezidanto Maŭ ja estas la ruĝa suno en la koro de la popolo, la granda savanto de la popolo. Tiu forta proletara sentimento boligis lian sangon tiel ke pli rapidiĝis liaj paŝoj kaj ekdancis la lignaj sitejoj portataj de li per vekto. Li zumis kaj kantis, kaj torentis el lia koro vortoj patosaj:

*Ruĝas la oriento, leviĝas la suno,  
En Ĉinio aperis Maŭ Zedong;  
Li laboras por feliĉigi la popolon,  
Li estas granda savanto de la popolo.*

Kaj ili formis la laŭtan kanton de la revolucia popolo *Ruĝas la Oriento*.

Ĉar tiu revolucia kanto intime esprimas la volon de la laboranta popolo kaj ĝian profundan proletaran sentimenton al la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, tial post prezento de kantodanca trupo ĝi rapide disvastiĝis en la vilaĝoj en la ĉirkaŭaĵo de Giahian-gubernio, trupoj kaj la popolo de la revoluciaj bazlokoj. Poste, dank' al senĉesa riĉigo, registro kaj rearanĝo fare de la laboranta popolo, ĝi fariĝis granda himno tre populara, kiu kuraĝigas la popolon senĉese marŝi antaŭen kaj fari revolucion.

La kanto *Ruĝas la Oriento* venigis en la mondon la socialisman novan Ĉinion. **“La popolo, nur la popolo, estas la movforto kreanta la mondan historion.”** “Prezidanto Maŭ amas la popolon” kaj ĉiam ligiĝas kun la popolo koron kun koro. La pulva fumo sur Gینگang-montaro, la piedsignoj de la Ruĝa Armeo sur la vojo de la Longa Marŝo kaj la lamplumo en la kaverndomo de la revolucia sankta loko Jan-an, ĉio ĉi tio estas historiaj atestoj, kiuj formas superban poemon pri la amo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ al la patrolando kaj al la popolo .

Prezidanto Maŭ estas nia vojkondukanto. Simile al vento, li helpas nian ŝipon antaŭenpuŝiĝi tra vastaĵo de ondegaj kaj simile al lumturo, li lumigas al ni la longan navigan vojon. Sub la gvido de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, “por konstrui novan Ĉinion” la ĉina popolo viglanime marŝis antaŭen, superis diversajn malfacilojn, venkis la

japanajn agresantojn, likvidis la reakcian regadon de la dinastio de Ĉiang Kajŝek kaj fondis novan Ĉinion. De tiam la ĉina popolo vere stariĝis kaj fariĝis la mastro de sia lando.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas nin: **“La Komunista Partio de Ĉinio estas la gvidkerno de la tuta ĉina popolo. Sen tia kerno, la socialisma afero ne povas venki.”** Alia strofo de la kanto sonas jene: “La Komunista Partio similas al la suno, lumas ĉie, kie ĝi brilas; kie aperas la Komunista Partio, tie liberiĝas la popolo.” La historia sperto de la ĉina revolucio pruvis, ke la Komunista Partio de Ĉinio persone edukita kaj konstruita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kun Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kiel la gvida penso estas la plej fidinda garantio por la liberigo de la popolo. Se ne estus la Kompartio, ja ne povus esti la nova Ĉinio. Hodiaŭ, dank' al hardado de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la Komunista Partio de Ĉinio fariĝis ankoraŭ pli fortika, pli kompakte unuiĝinta kaj pura. La popolo de nia lando firme decidis kompakte unuiĝi sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro, kun la veraj marksism-leninismaj partioj kaj organizoj de la tuta mondo kaj kun la proletaro, la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo, batali kune kun ili por **elimini la sistemon de ekspluatado de homoj al homoj sur la tero kaj liberigi la tutan homaron.**



*Junulinoj de Ĉinio kaj Albanio laŭte kantas “Ruĝas la Oriento” kaj “Agloj de Gerila Taĉmento”.*



# Pri Trifoja Ŝanĝo de Nomo

**M**I iam havis nomon Lin Akjuan kaj alian Lin Ĝongguj. Nun mi nomiĝas Vej Ĝongguj.

Ŝanĝi nomon ŝajnas simpla afero. Tamen la procezo de la trifoja ŝanĝo de mia nomo estas historio pri sufero kaj feliĉo.

Mia hejmloko estis Ŝanvaj-vilaĝo, Du-an-gubernio, Guanghi. Antaŭ la Liberiĝo, mia familio konsistis el gepatroj kaj ni 6 gefratoj, sed havis nur 3 malgrandajn parcelojn de montagro kaj loĝis en kabano. La patro servis al kapitalisto kiel portisto kaj la patrino kaj pliaĝaj fratinoj laboris ĉe bienulo. Kvankam ili laboregis tagojn kaj noktojn, tamen ĵili ne povis vivteni la familion, tiel ke ni ofte trovis nenion por kuiri. Devigite de la vivo la patro prenis de la bienulo procentegan prunton de 40 juanoj kaj de tiam ekportis sur sin "diablan ŝuldon" ne finpageblan. Por pagi la ŝuldon mia pliaĝa frato devis labori kiel jardungito ĉe la bienulo. Elpremite lian ŝviton kaj sangon, la damninda bienulo fine forprenis lian vivon. Nelonge post tio niaj tri malgrandaj parceloj falis en la manon de la bienulo.

Kvankam mia frato mortis kaj la bieno estis perdita, tamen ni ankoraŭ ne povis per tio likvidi la ŝuldon. Pelite en senelirejon, la patro kun dolorego vendis min al homkomercisto Lin por pagi la ŝuldon. Tiam mi estis knabino nur 6-jara kaj familianoj nomis min Along. La homkomercisto poste min vendis al iu burokrata kapitalisto Li en la urbo Nanning, kiu donis al mi nomon Lin Akjuan (*kjuan* signifas hundon). De tiam mi enpaŝis en la homan inferon kaj spertis tie ĉiajn suferojn.

Ĉe la kapitalisto, ĉu en frosta vintro aŭ en varmega somero mi tagnokte devis senripoze boligi akvon, purigi ĉambrojn, prezenti teon kaj manĝojn, porti urinuojn, lavi vestojn kaj nutri hundon. Laciĝo dolorigis al mi la talion kaj krurojn, kaj pro turmentado mi kaptuniĝis kaj fariĝis skeleta. La kapitalisto nomis min Akjuan. Fakte, en la hommanĝa malnova socio mi eĉ vivis malpli bone

ol la hundo de la kapitalisto. Lia hundo manĝis rizon kaj viandon, dum mi ne povis min satigi eĉ per restinta supo kaj putriĝinta manĝaĵo. Kiam mi atingis pli da aĝo, mi provis eskapi el la faŭko. Foje, sub la helpo de servistino Onklino Hju, mi forkuris de tie. Sed apenaŭ mi atingis la kajon, mi estis forkaptita de lakeoj de la kapitalisto. Pendiginte min la kapitalisto batis min tiel forte ke al mi restis nur lasta spiro, sed tio ankoraŭ ne povis kvietigi lian koleron. Ĉe la sama nokto li eĉ provis min pafmortigi. Nur dank' al Onklino Hju, kiu kaŝis min, mi do evitis la morton. Post tio la kapitalisto kruele malpermesis al mi elpaŝi la sojlon de la pordego, tiel ke mi tute apartiĝis de la ekstera mondo.

En 1938, la kapitalisto transloĝiĝis de Nanning al sia hejmloko kaj ankaŭ mi estis kunportita al Huajuan-urbeto de Iŝan-gubernio. Tie la kapitalisto min vendis al iu kulako de vilaĝo kaj surskribis Lin Ĝongguj kiel mian nomon en la kontrakto pri vendo. Tio estis la dua fojo por mi ŝanĝi la nomon. Tio estis alia paĝo de mia sangplena historio, kiu atestis mian transiron de unu faŭko al alia.

Kvankam al mi estis donita la homa nomo, tamen la kruela ekspluata klaso neniam traktis min kiel homon. Ĉe la kulako, tio, kion mi manĝis, restis la nutraĵo por porkoj kaj hundoj kaj mi laboris kiel bovo kaj ĉevalo. Mi suferis de vipado kaj insulto, iam eĉ estis katenita je ambaŭ piedoj. Ĉu ne venos fino de la suferoj por la malriĉuloj en la malnova socio?

Ĝuste kiam mi baraktis sur la mortlinio, Huajuan-urbeto estis liberigita. Same kiel miloj kaj dekmiloj da laborantaj popolanoj mi fariĝis mastro de la ŝtato.

Sub la saĝa gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, ni renversis la bienulan klason kaj distribuis al ni bienon kaj suriris la brilan larĝan vojon de kooperativigo kaj komunumigo. Ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj vivis pli kaj pli feliĉe. Mi komplete liberiĝis en politiko kaj ekonomio. En 1957 mi glorie aliĝis al la granda

Komunista Partio de Ĉinio. Post starigo de la popola komunumo mi estis elektita kiel komitatano de la partia filio de la produkta brigado, virina estro de la brigado kaj prezidanto de la Ligo de Malriĉkamaranoj kaj Malsuperaĵ Mezkomparanoj de la brigado. Miaj kvar filoj ĉiuj havas laboron.

Mi nun jam estas 52-jara, tamen mi sentas, ke ju pli mi vivas, des pli mi juniĝas. Sub la eduko kaj kulturo de la Partio mi komprenis, ke ni malriĉuloj en la malnova socio multe suferis ĝuste pro tio ke ni ne havis potencon. Kaj nun en la nova socio ni tiel bone vivas, ĉar ni havas potencon. Havante regpotencon de la proletaro, ni havas ĉion.

Post la Liberiĝo, la Partio kaj popola registaro montris al mi grandan zorgon. Ekde 1950 ili ĉiamaniere helpis min serĉi miajn familianojn. Sed mi ne scias eĉ mian originan nomon pro mia vendiĝo en la infaneco, tial tre malfacila estis la serĉado. Foje kamaradoj de Du-an-gubernio raportis, ke la sufera pasinteco de kamarado Vej Ŝoŭ el Liuje-komunumo, kiu venis al la gubernio por lerni, tre similis al la mia. Informiĝinte pri tio, la gvida instanco opiniis, ke tio estas grava spuro. Oni tuj kondukis min al kamarado Vej Ŝoŭ. La pasintaj travivaĵoj, kiujn ni parolis, tre similis unu al alia. Sed, ĉar mi estis vendita de infanaĝo kaj ne povis klare memori la konkretajn aferojn pri la familio, tial ni malfacile tuj konstatis, ĉu ni estas propraj gefratoj.

Por plie konstati la aferon, sub la helpo de la gvida instanco mi kune kun kamarado Vej Ŝoŭ iris al Liuje-komunumo, Du-an-gubernio. Veninte tien mi sentis tieajn verdajn montojn kaj akvojn eksterordinare intimaj. Enirinte Ŝanvaj-vilaĝon, mi tuj rekonis mian propran pliaĝan fratinon el inter la densaj bonvenigantaj amasoj. Mi kaptis ŝin kaj ni firme brakumis unu la alian. Plenaj de malĝojo kaj ĝojo ni povis eldiri nenion pro emocio.

Tiel ni samfamilianoj feliĉe kunestis sub la helpo de la gvidantoj kaj amasoj! Kamarado Vej Ŝoŭ, kiu partoprenis studrondon kune kun mi, estas mia malpliĝa frato. Post la Liberiĝo li aliĝis al ĈPLA kaj post la demobilizo li fariĝis kadro kaj nun li estas vicsekretario de la partia komitato de Liuje-komunumo. Lia unua filo nun laboras en geologia prospektora taĉmento, lia unua filino estas laboristino kaj malgranda filino lerneĵano. Tre feliĉe vivas lia familio.

La ĝojiga novaĵo pri la feliĉa kunesto de nia familio tre rapide disvastiĝis en la tuta komunumo kaj en gubernioj Du-an kaj Iŝan. Nemalmultaj komunumanoj venis por viziti nin. Ĝoje kunestante kun samlokanoj ni foje kaj refoje laŭte kriis: "Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!" "Vivu Prezidanto Maŭ!"

Mi trovis miajn familianojn, revenis al la longe forlasita hejmloko kaj sciis mian veran nomon. Mi kun ĝojo elmetis al koncerna unuo de la registaro mian postulon pri ŝanĝo de mia nomo kaj baldaŭ ricevis aprobon. Nun mi jam nomas min Vej Ĝongguj. Tiu ŝanĝo de nomo jam estas la triafoja por mi. En la pasinteco ŝanĝoj de nomo signifis pli da sufero kaj ĉifoja signifis pli da feliĉo.

Hodiaŭ, kiel la tutlanda popolo mi vivas feliĉan vivon. Tamen nun en la mondo ankoraŭ estas multaj laborantaj popolanoj kiuj ankoraŭ vivas sub la sklavigo de imperiismo, reviziismo kaj reakciularoj kaj ne liberiĝis el sub ilia regado. Miloj kaj dekmiloj da samlandanoj en Tajvan ankoraŭ vivas tragikan vivon sub la ekspluatado de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, ke familianoj devigite disiĝis aŭ mortis. Mi nepre respondos la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ "**teni la revolucion, stimuli la produkton**", gvidos la amasojn konstrui novan socialisman kamparon kaj dediĉos mian forton por liberigi la sanktan teritorion de la patrolando Tajvan kaj subteni liberigan batalon de la subpremataj popoloj de la mondo!

*Kamaradino Vej Ĝongguj diligente studas verkojn de Prezidanto Maŭ.*





# Fine Rebatas la Koro de Cong Kinghong

**L**UMATENE en septembro 1970, Cong Kinghong, telefonisto de la telekomunika stacio de iu trupo de la Mara Armeo de ĈPLA, eliris en ŝtormo por plenumi taskon. Reveninte, li demetis sian malsekigitan veston kaj kiam li pendigis ĝin sur eksterdoman draton, li estis teren faligita de potenca elektrobato, ĉar la drato kontaktiĝis kun elektra fadeno rompita de la ventego. Post 20 minutoj li estis portita al hospitalo. Tiam lia koro jam ĉesis bati, la pupiloj grandiĝis ekstreme kaj perdis sian lumreflekson. Nia savgrupo tuj faris al li brustan masaĝon, provizon de oksigeno per tubo kaj injektadon de medikamento, sed lia koro ankoraŭ ne rekomencis bati.

En malnova medicina literaturo oni rimarkigis ke nesavebla estas homo post 6-minuta ĉeso de korbato. Tiel longe ĉesis la korbato de Cong Kinghong kaj neniu el la kuracistoj kaj flegistinoj de nia grupo havis sperton kuraci pacienton en tiel serioza stato. Kion fari? Ni kune studis instruojn de Prezidanto Maŭ por elĉerpi el ili saĝon kaj inspi-

ron. Prezidanto Maŭ instruas al ni: "En iuj tempoj dum la revolucia batalo la malfavoraj cirkonstancoj superas la favorajn... Sed, dank' al sia penado la revoluciuloj povas venki paŝon post paŝo la malfacilojn kaj krei novan favoran situacion; tiam la malfavora situacio cedas lokon al favora." Ni pensis, ke la tro longatempa ĉeso de lia korbato, niaj ne tre bonaj ekipaĵoj kaj malalta tekniko ja estas malfavoraj kondiĉoj objekte ekzistantaj; sed dum la masaĝo okazis al la paciento momenta malforta spiro, kio montris eblecon de lia reviviĝo.

Por akceli rekomencon de la spirado kaj korbato de Cong Kinghong, ni decidis malfermi lian bruston kaj fari al lia koro rektan masaĝon. Ni malfermis la bruston de la paciento. Neniom sangis la enranĉo longa je 15 centimetroj kaj la koro kuŝis senmova en la brusto. Tiam lia korbato ĉesis jam 44 minutojn.

La tempo signifis vivon! Kun forta deziro revivi la klasan fraton, armeaj kuracistoj Ĝang Dianĉang, Vu Jing kaj Niu Venge absorbite faris



*Medicinaj laborantoj kaj Cong Kinghong (la dekstra) kore interparolas.*

alterne al Cong Kinghong rektan kormasaĝon kun ĉiuminuta frekvenco de 60-80 fojoj. Tio estas tre delikata laboro, tro malpeza movo de la masaĝo ne efikas, dum peza movo povas difekti la koron. La tri kuracistoj verŝis sian amon al la klasa frato sur la precizajn masaĝajn movojn. Post 8-minuta masaĝo kaj injekto de medikamento, la koro de Cong Kinghong subite ekstremis kelkfoje. La ĉeestantoj tre ĝojigis, sed post unu minuto ĉesis la tremo. Kvankam ni aplikis diversajn rimedojn, lia koro tamen ne povis rekomenci batadon.

Lia korbato ĉesis jam 108 minutojn. Ĉu ni ankoraŭ povis savi lian vivon? Ni iom maltrankviligis. Tiutempe, sekretario de la hospitala partia komitato kamarado Feng Juejong voĉlegis al ni la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Ofte okazas, ke favora situacio kaj la iniciativo revenas kiel rezulto de la klopodo ‘persisti ankoraŭ iom pli longe’.”** La granda instruo de Prezidanto Maŭ ja estas ĝustatempa pluvo kaj lumturo por navigado! Post studo de tiu instruo plifirmigis niaj decido kaj memfido por savi nian kunbatalanton. Ni kune analizis la favorajn kaj malfavorajn kondiĉojn antaŭ ni: La paciento ne reviviĝis en tiel longa tempo pro tio ke lia koro difektiĝis relative serioze, kio estis malfavora kondiĉo; sed aliaj partoj de lia organismo estis bonaj, kvankam lia koro ne povis bati, tamen ankoraŭ povis akceli sangan cirkulon kaj estigi neregulan spiron dank’ al la ritma masaĝo. Tio estis favora kondiĉo. Sekve, ni plie konis, ke en tia stato ĉu oni povas plene disvolvi la favoran flankon kaj konkeri la malfavoran, tio ĉefe dependas de nia persistado. Persisto povas iom post iom akceli reviviĝon de la paciento; sen persisto eĉ la favora situacio povas cedi lokon al la malfavora kaj kaŭzi morton al la paciento.

Sekve, ni levis nian kuraĝon kaj daŭrigis la urĝan savon sub direktado de la brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ. Post rekta kormasaĝo de 159 minutoj finfine denove ekbatis la koro de Cong Kinghong!

Pasis 203 minutoj de la elektrobato trafita de Cong Kinghong ĝis la denova ekbato de lia koro. Estis la granda Maŭzedongpenso, kiu direktis nin venki malfacilojn kaj igi lian koron rebati; estis la granda Maŭzedongpenso, kiu donis al li la duan vivon.

La urĝa savo de paciento elektrobatita estas tre komplika procedo. La rekomenciĝo de la korbato estis nur la unua paŝo por la urĝsava laboro. Por vere teni lin viva oni ankoraŭ devis preventi serion da komplikaĵoj kaŭzitaj de la korbata

ĉeso kaj venki multajn mortigajn malfacilojn. Eĉ malgranda neglekto povas kaŭzi al la paciento morton aŭ dumvivan kripliĝon. Sukcesinte refunkciigi la koron, ni firme decidis ne nur revivigi nian klasan fraton, sed ankaŭ ne restigi al li ian kripliĝon por ke li sane revenu al sia batala posteno.

Posttagmeze de la tago, en kiu denove ekbatis la koro de Cong Kinghong, lia kazo subite malboniĝis: malleviĝis lia sangpremo kaj aperis ŝoko. Ni tuj aplikis medikamenton por levi lian sangpremon. Ĉar ankoraŭ ne tute restariĝis la funkcioj de lia koro, aperis kolapso de periferia cirkulado. Se oni ne ĉesigos tion, ĝi kondukos al angiospasmato de reno, kaŭzos malfortiĝon de la funkcio de la renoj kaj tiel estigos morton. Por solvi tiun kontraŭdiron, ni alterne aplikis, kontraŭe al la rutino, angioldilatan medikamenton en dozegoj kaj sangprem-levan medikamenton malgranddoze por ke ili kune donu necesan efikon, kaj per tio ni finfine venkis la ŝokan danĝeron.

Post nelonge, al Cong Kinghong aperis serioza stato de spira malfacilo, ĉar li estis en svena stato kaj perdis glutan kapablon, tial retroira manĝaĵo eniris en la trakeon dum spiro. Por solvi tiun problemon, oni devis tuj malfermi la trakeon kaj forigi la manĝaĵon. Ĉu li povis elteni trakeotomion post la ĵus farita brusta operacio? La instruo de Prezidanto Maŭ **“El la du kontraŭdiraj flankoj unu devas esti la ĉefa kaj la alia neĉefa”** pliapeŝe konigis al ni, ke se oni ne faros al li trakeotomion, la manĝaĵo facile kaŭzos ne nur infekton al la pulmo sed ankaŭ sufokan morton al la paciento pro trakea obstrukco kaŭze de akumuliĝo de manĝaĵo. Tio estas la ĉefa flanko de la kontraŭdiro. Trakeotomio eble kaŭzos infekton, kio tamen povos esti preventata per zorga aranĝo kaj atenta flegado. Sekve, ni senhezite faris al li trakeotomion kaj forigis la miseniĝintan manĝaĵon, tiel ke lia sanstato pliboniĝis.

Tiamaniere, sub la direktado de la brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ, ni solvis multajn komplikajn problemojn en kuraco, tiel ke tiu batalanto, kies korbato ĉesis longtempe, pasigis plurajn mortajn danĝerojn kaj akiris novan vivon. Je la tria tago post la denova ekbato de la koro, Cong Kinghong vekigis de la sveno kaj mallaŭte kriis: **“Vivu Prezidanto Maŭ!”** Post 20 tagoj, li reakiris sian memorkapablon kaj povis reciti la artikolon *Servu al la Popolo*; post 29 tagoj, li povis ellitiĝi, promeni kaj studi verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun la aliaj. Nun li jam fundamente resaniĝis kaj povas partopreni ordinaran fizikan laboron.



# Ĉiam Esti Pioniro en la Tri Grandaj Revoluciaj Movadoj

—Pri kamarado Liu Gintang, vicedestro de la Revolucia  
Komitato de la Ŝanhaja Kaldronega Fabriko

**L**IU Gintang de la Ŝanhaja Kaldronega Fabriko estas membro de la Komunista Partio de Ĉinio kaj tutlanda labormodelo. Li havis la feliĉon kvinfoje vidi la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ. En la batalo inter la du klasoj kaj la du linioj, kun senlime profunda proletara amo al Prezidanto Maŭ, li brave defendas lian revolucion linion, kaj en produkta batalo li kuraĝas sturmi kaj faris pli ol 300 inventojn kaj teknikajn renovigojn, per kiuj li faris indan kontribuon al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Liu Gintang naskiĝis en kamparo de Ĉangŝu-gubernio de Giangsu-provinco. Lia avo estis forĝisto; lia patro migris al Ŝanhajo kie li penlaboradis tutjare sed ne povis vivteni la familion. En sia aĝo de 13 jaroj, Liu Gintang fariĝis metileranto en iu forĝejo de Ŝanhajo. Li laboris 16 horojn ĉiutage, sed estis ofte batita kaj insultita. Poste, duono de lia montra fingro estis detranĉita de maŝino kaj li estis eksigita de la damninda kapitalisto. Estas nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, kiuj savis lin el la maro de mizero.

*Liu Gintang studas la verkon "Pri Praktiko" kune kun gelaboristoj.*



Li havas senkomparan malamon kontraŭ la malnova socio kaj senliman amon al la Partio kaj Prezidanto Maŭ. Sed li ofte diras: “Estas ne sufiĉe por ni revoluciaj laboristoj havi nur dankemon pro la liberiĝo, plej grave estas vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson, plenumi kaj defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Mi decidis sturmi dum la tuta vivo por la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj batali ĝis la fino por plifirmigi la proletaran diktaturon.”

Jam en 1954 Liu Gintang komencis studi la brilantan verkon de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo*. Li diris en senlima emociiĝo: “Ĉiuj vortoj de Prezidanto Maŭ estas skribitaj por ni laboranta popolo kaj reprezentas la interesojn de ni laboristaro. Mi nepre serioze studos kaj firme observos ilin.” Sed la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj komplikoj morte timis kaj malamis Maŭzedongpenson kaj per ĉia rimedo malhelpis kaj obstrukcis la disvastigon de Maŭzedongpenso. Liu Gintang pensis en si: Ju pli la malamikoj opozicias Maŭzedongpenson, des pli mi devas serioze studi kaj entuziasme propagandi ĝin. Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando, Liu Ŝaŭki kaj liaj komplikoj freneze obstrukcis la eldonon kaj distribuon de verkoj de Prezidanto Maŭ. Liu Gintang akiris de iu oficiro ekzempleron de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Reveninte al la fabriko, li faris, kune kun dekelkaj junuloj, dekelkajn kopiojn per tri sinsekvaj tagnoktoj kaj ilin disdonis al la grupoj de la laborejo por ke aliaj studu kaj apliku Maŭzedongpenson, por ke ĝi akiru grandan disvastigon en la fabriko.

Kun Maŭzedongpenso kiel armilo, en gravaj momentoj de lukto inter la du klasoj, la du vojoj kaj la du linioj, Liu Gintang faris firman batalon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki.

En la tagoj de la granda antaŭensalto en 1958, respondante alvokon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, Liu Gintang rompis superstiĉon kaj liberigis la penson. Li gvidis laboristajn amasojn disvolvi la sentiman spiriton kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi, kaj post multfoja malsukceso sukcesis krei senŝtopilan tubokurbigan maŝinon de avangarda nivelo. Iun tagon, kelkaj burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” sciigis al Liu Gintang, ke li partoprenu kunvenon. Tiuj burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” tute ne kredis, ke Liu Gintang sukcesos krei tian maŝinon, sed post la sukcesa fabriko de la maŝino, ili haste intervenis en la aferon kun la intenco uzurpi la laboran frukton de la laboristaj amasoj. La

kunveno celis aprobigi iun raporton kaj diskuti, kiam premion la invento meritas. Informiĝinte pri tio, Liu Gintang eksplodis de indigno kaj firme diris al ili: “Mi ĝojos, se vi helpos min resumi sperton. Se la kunveno diskutos pri premio, mi ne partoprenos.” Indigne li forlasis la kunvenejon. Sed tiuj burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” neniel povis forgesi la grandan sumon de “premio por invento” kaj sendis al Liu Gintang raporton por ke li subskribu. Sed li diris: “Ni estas mastroj de la ŝtato kaj ne devas esti sklavoj de mono. Ni faras teknikan renovigon por la revolucio, por socialismo; materia stimulo povas nur korodi la laboristan klason, deviigi nin al la kapitalisma vojo. La monon ni neniel devos akcepti.” Li rifuzis subskribi la raporton.

En 1962, kiam nia lando trafis portempan ekonomian malfacilon kaŭzitan de seriozaj naturaj katastrofoj, Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en industrio levis herezan venton de “deĉevaliĝo” (t. e. ĉeso) kaj la vento atingis ankaŭ la Ŝanhajan Kaldronegan Fabrikon. Kune kun aliaj laboristoj Liu Gintang studis la instruon de Prezidanto Maŭ pri “**sinapogo sur propraj fortoj**” kaj diris: “Nun imperiismo kaj ĝiaj lakeoj intencas sufoki nian kemisterkan industrion; produkto de granda kemisterka ekipaĵo estas bezonata por subteni agrikulturon kaj batali kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj reakciuloj de ĉiuj landoj. Ni ĉinaj laboristoj armitaj per Maŭzedongpenso certe povos fabriki spiralan tubon.” Ĉiuj decidis iri la vojon montritan de Prezidanto Maŭ kaj “surĉevaligi” sed neniam “deĉevaligi” la produkton de spirala tubo. Liu Gintang kaj laboristoj tuj ĵetis sin en intensan laboron. En fabrikado de ŝlosila parto de spiraltuba maŝino ili renkontis multajn malfacilojn, sed ĉiufoje, kiam Liu Gintang rememoris la feliĉajn akceptojn fare de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, li tuj estis plenigita de neelĉerpebla forto. Laborante tage kaj nokte kune kun laboristoj, li resumis sperton kaj ĉerpis lecionon el ĉiu malsukceso, kaj fine ili elfaris spiraltuban maŝinon. Kiam dikmura tubo kun longeco de pli ol 70 metroj spirale eliris el la maŝino, Liu Gintang kaj la laboristoj ĝojplene kriis: “Vivu Prezidanto Maŭ! Longe vivu Prezidanto Maŭ!”

Post kiam Liu Gintang fariĝis vicestro de la revolucia komitato de la fabriko, li pli konscie tenas la batalon inter la du klasoj kaj la du linioj, senŝanceliĝe efektivas la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Li diris: “Se ni ne firme plenumos la revolucion linion de Prezidanto Maŭ, ni perdos la regpotencon akiritan. Ni povos bone



teni ĝin, nur se ni firme plenumos la revolucion linion de Prezidanto Maŭ.” Kiam li gvidis laboristajn amasojn fabriki malgrandradiusan aŭtomatan tubokurbigan maŝinon, li refoje montris sian senliman fidelecon al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

En novembro de 1968, ŝanhajaj laboristoj akceptis ekstreme gloran taskon — mem projekti, fabriki, konstrui kaj instali la unuan 125,000-kilovatan vaporturbinan generatoran kompleton kun duobla akva interna malvarmigo de nia lando. La Ŝanhaja Kaldronega Fabriko prenis sur sin la taskon fabriki unu el la ĉefaj partoj de la kompleto — alttemperaturan kaj altpreman kaldronegon kun interna revarmigo kaj kapacito de 400 tunoj.

8,000 ŝtalaj tuboj de la kaldronego devis esti kurbigitaj kaj por tio oni bezonis malgrandradiusan aŭtomatan tubokurbigan maŝinon, alie oni ne povus plenumi la taskon en difinita tempo. Liu Gintang gvidis laboristojn al la revolucia komitato por peti la penigan taskon de fabriko de tia maŝino. Sed post kiam ili prenis sur sin la taskon, burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” kapskuante diris: “Estas vera mito fari malgrandradiusan tubokurbigan maŝinon kun avangarda nivelo de la mondo sen ma-

terialo, sen bluplano, sen precedenco!” Liu Gintang elokvente montris: “Havante Maŭzedong-enson kiel akran armilon, ni laborista klaso faros kion la okcidenta burĝaro ne kuraĝas fari, iros vojon kiun la okcidenta burĝaro ne kuraĝas iri kaj surgrimpos la kulminon de scienco kaj tekniko.” Kune kun laboristaj amasoj kaj revoluciaj intelektuloj, li rapide desegnis projektan planon de malgrandradiusa tubokurbiga maŝino kaj plej rapide elfaris la maŝinon dank’ al subteno de laboristoj de la tuta fabriko.

Komenciĝis provado de la maŝino. Oni metis en ĝin ŝtalajn tubojn unu post alia, sed ĝi eligis la tubojn platiĝintaj, aliformiĝintaj aŭ kreviĝintaj. Iuj deprimate diris: “Ni malsukcesis!” Sed Liu Gintang diris: “Ne, tio estas la komenco de sukceso.” Kaj ili denove batalis ĉe la ilmaŝino por ripari kaj plibonigi ĝin forgesante manĝon kaj dormon.

Forpasis kvin diurnoj, sed ili ankoraŭ ne trovis la kaŭzon. Ĉiuj malpacienciĝis. Liu Gintang kaj aliaj laboristoj demetis la instrumentojn kaj komencis studi la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiro*. Prezidanto Maŭ instruas: “... ĉe studo de kiu ajn procezo, se tiu estas komplika, enha-



*Liu Gintang (la unua de maldekstre) ekzamenas la kvaliton de veldaĵo kune kun laboristo kaj teknikisto.*



*Liu Gintang (la dekstra) laboras kune kun laboristo.*

vanta du aŭ pli multajn kontraŭdirojn, ni devas fari nian plejblon por trovi la ĉefan kontraŭdiron. Kiam tiu ĉi estas kaptita, ĉiuj problemoj povas esti facile solvitaj.” Al ĉiu heliĝis en la kapo kaj ili decidis serĉi la ĉefan kontraŭdiron. Iuj diris: “Se ni provos per travidebla tubo, ni povos klare vidi la internon de la maŝino kaj tiel ni povos tuj trovi la kaŭzon kaj solvi la kontraŭdiron.” Liu Gintang ĝoje diris: “Jen la ĉefa kontraŭdiro.” Ili decidis anstataŭigi ŝtalan tubon per travidebla plasta tubo. Post pli ol dudek provoj, ili sukcesis fabrikigi travideblan nilonan tubon. Post provado per tia tubo ili trovis neperfektaĵon de la maŝino kaj solvis la problemon. Liu Gintang kaj aliaj laboristoj ĝustatempe kreis la unuan malgrand-radiusan tubokurbigan maŝinon de nia lando kun monda avangarda nivelo, per kio estis elhakita vojo por nia lando en fabrikado de alteperatura kaj altprema kaldronego kun granda kapacito. Kune kun aliaj laboristoj kaj revoluciaj teknikistoj, Liu Gintang rompita la rutinon de pli ol cent jaroj de la mondo, ke fajroĉambro devas havi formon de

orta paralelepipedo, projektis kaj fabrikis ĉinstilan kaldronegon kun ronda fajroĉambro. En prova funkciigado tia kaldronego montris grandegajn superecojn: Ĝi produktas vaporon rapide, havas grandan efikecon sed malgrandan volumenon kaj donas grandkvantan vaporon. Por fabrikigi tian kaldronegon oni bezonas nur malpli ol duonon de la materialoj bezonataj por malnova kaldronego kun orta paralelepipedo fajroĉambro de sama potenco.

Post kiam Liu Gintang fariĝis vicestro de la revolucia komitato de la fabriko, li ankoraŭ persistas en partopreno de kolektiva produkta laboro kaj havas tre intiman ligiĝon kun la amasoj konservante propran karakteron de la laboranta popolo. Kelkfoje se li kunvenis en tago, li iris labori en nokto-skipo. Kiam laboristoj demandis al li kun rideto, kiun deĵoron li prenas, li serioze respondis: “Mi prenas revolucionan deĵoron. Por defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ, mi neniam ĉesos deĵori.”



# Verkoj de Maŭ Zedong

(en Esperanto)

(Parto de la verkoj el la periodo 1926-1937)

Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio	24 pĝ.
Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan	76
Kial Ruĝa Politika Potenco en Ĉinio Povas Ekzisti?	28
Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio	28
Sola Fajrero Povas Bruligi Tutan Stepon	28
Kontraŭ Libroadorado	20
Zorgu la Vivon de la Amasoj, Priatentu Metodojn de Laboro	16
Pri Taktiko kontraŭ la Japana Imperiismo	60
Strategiaj Problemoj en la Ĉina Revolucia Milito	148
La Taskoj de la Komunista Partio de Ĉinio en la Periodo de Rezistado kontraŭ Japanio	56
Pri Praktiko	32
Pri Kontraŭdiro	68


Eldonitaj de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio  
Distribuas la Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo  
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

# Revolucia Moderna Baledo “Ruğa Virina Taçmento”



Hong Çangking, la partia reprezentanto de la virina roto de la Çina Laborista-Kamparana Ruğa Armeo, senlime fidela al Prezidanto Maŭ.






Vu Kinghua, filino de malriĉkamparano, estas fermita en subtera karcero de tirana bienulo Nan Batian. Kun brulanta malamo en la okuloj, ŝi deziras tute frakasi la neston de la hommanĝantaj banditoj.

*Dekstre:* Eskapinte el la bandita nesto, Vu Kinghua salte sin ĵetas en profundan kokosarbaron.









Kun profunda proletara sentimento, Hong Càngking  
montras al Vu Kinghua la vojon de revolucio.





La batalantoj de la Ruĝa Virina Taĉmento diligente sin ekzercas en batalarto.







Veninte al la ruĝa bazloko  
por aliĝi al la Ruĝa Armeo,  
Vu Kinghua ekvidas la ruĝan  
flagon kaj emociiĝas ĝis larmoj.

Kun profundega malamo al  
la bienularo, Vu Kinghua in-  
digne akuzas la ĝisĉielajn kri-  
mojn de Nan Batian.





Bone komprenite la revolucion veron diritan de la partia reprezentanto, Vu Kinghua firme decidis batali dum la tuta vivo por liberigi la tutan homaron.

La Ruĝa Armeo atakis kaj okupis Jelingaj. Vu Kinghua indigne faligis Nan Batian per piedbato kaj fine pafmortigis la krimigan kontraŭrevolucionan ĉefon.





La baledo "Ruĝa Virina Taĉmento" priskribas la batalan procezon de la naskiĝo, kreskado kaj fortiĝo de la revolucia armita forto Ruĝa Virina Taĉmento, kiu batalis sub la ĝusta gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, sur Hajnan-insulo, dum la Dua Enlanda Revolucia Milito (1927-1937). La tuta baledo prikantas la partian reprezentanton Hong Ĉangking de la Ruĝa Virina Taĉmento, kiu memkonscie, fidele kaj kuraĝe defendis la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ kun la plej alta heroismo "ne timi kap-oferon, por defendi l' veron". Ĝi prezentas al ni, kiel la sklavknabino Vu Kinghua indigne ekribelas, fuĝas el la bandita nesto, aliĝas al la Ruĝa Armeo kaj dank' al edukado de la partia reprezentanto Hong Ĉangking fariĝas komunisma avangarda batalanto hardite en revolucia batalo. Ĝi montras al ni, ke la subpremataj popoloj povos plene sin liberigi, nur se ili prenos pafilojn kaj iros la vojon de kapto de regpotenco per armitaj fortoj. La tuta baledo prezentas al ni imponan bildon de popola milito.



Unu Hong Ĉangking martiriĝis, sed miloj kaj miloj da revoluciuloj leviĝis.


La baleado "Ruĝa Virina Taĉmento", kiu estas tute libera de la rutinaj reguloj de la malnova baleada arto, kreis kaj aplikis rafinitajn kaj tipigajn dancesprimojn kaj fortajn kaj bravajn plastikajn pozojn, sukcese skulptis la brilajn figurojn de la proletaraj herooj Hong Ĉangking kaj Vu Kinghua, per klara klaseco, vasta amaseco kaj impona epoka etoso. La giganta figuro de Hong Ĉangking estas koncentra resumo de la eminentaj kvalitoj de la proletaro, la popola armeo kaj kompartiano. Kaj Vu Kinghua estas tipa figuro de la milionoj kaj milionoj da subpremataj kaj sklavigataj laborantaj popolanoj kiuj klopodas por frakasi la ferajn ĉenojn de mil jaroj.

La sukcesa kreo de la baleado "Ruĝa Virina Taĉmento" estas granda venko de la proletara revolucia linio de literaturo kaj arto de Prezidanto Maŭ kaj giganta frukto diligente elkulturita de kamaradino Giang King. Ĝi elhakis tute novan vojon por la prospero kaj disvolviĝo de la ĉina baledarto.



Ili marŝas antaŭen, triumfe marŝas antaŭen sub la standardo de Maŭ Zedong!





Sub la eduko de la Partio kaj post hardado en la revolucia batalo, Vu Kinghua rapide kreskis en komunisman avangardan batalanton.

# Ĉie en Nia Lando Floras Lokaj

## Mezgrandaj kaj Malgrandaj

### Industriaj Entreprenoj

**S**UB la direktado de la orientilo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo**”, ĉie en nia lando floras lokaj mezgrandaj kaj malgrandaj industriaj entreprenoj. De la tibeta altebenejo ĝis la bordo de Hejlong-rivero, de la suda kaj norda piedoj de Tianŝan-montaro ĝis la bordo de la Orienta Maro, prospere disvolviĝas malgrandaj fabrikoj de ŝtalo kaj fero, kemisterko, maŝino, cemento kaj kemiaĵoj kaj malgrandaj karbominejoj kaj hidroelektrejoj, kvazaŭ bambuido post printempa pluvo. Milo da malgrandaj fabrikoj, laborejoj kaj industriaj produktaj grupoj stariĝis en la lastaj 2-3 jaroj en Hejlonggiang-provinco kaj ilia nombro estas pli granda ol la totala nombro de tiuj starigitaj en la 17 jaroj antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio. Sur la tibeta altebenejo, fame konata kiel “**firsto de la mondo**”, jam stariĝis diversaj industriaj branĉoj de la loko, kiaj tiuj de karbo, kemiaĵoj, konstrua materialo kaj maŝinfabrikado. En triono de la gubernioj de la aŭtonoma regiono jam konstruiĝis mezgrandaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj, kaj en Lhasa, Ŝekaze, Nakju, Ŝannan, Ĉangdu kaj aliaj urboj jam stariĝis riparejoj kaj fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj. En la provincoj Hebej, Gansu, Gianghi, Junnan k. a. jam establiĝis respektive pli ol milo aŭ miloj da mezgrandaj aŭ malgrandaj fabrikoj.

La rapideco de la altiĝo de la produkta povo kaj la multeco de la novproduktitaj varoj de la loka

industrio estas senprecedencaj. Laŭ nekompleta statistiko, la produktopovo de gisfero de la lokaj malgrandaj ŝtalfabrikoj en 1970 kreskis 1.5-oble kompare kun tiu de 1969, kaj la produktokvanto de gisfero kreskis 1.8-oble. La produktokvantoj de nitrogena sterko kaj sinteza amoniako de la malgrandaj kemisterkaj fabrikoj kreskis je 60-70% kompare kun tiuj de 1969. La produktokvanto de la diverslokaj malgrandaj cementaj fabrikoj kaj kemisterkaj fabrikoj konsistigas 40 procentojn de la totala produktokvanto de la tuta lando.

Sekvante la ĝeneralan principon de Prezidanto Maŭ por disvolvi la nacian ekonomion “**preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron**”, la vastaj amasoj de revoluciaj kadroj, revoluciaj laboristoj kaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de diversaj regionoj persistas en la ĝusta direkto de subtenado de industrio al agrikulturo en starigo de lokaj industrioj, kaj energie disvolvas mezgrandajn kaj malgrandajn fabrikojn servantajn al agrikulturo. En pli ol 20 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de nia lando fondiĝis fabrikoj de man-traktoroj, malgrandaj motor-fabrikoj, diversaj malgrandaj fabrikoj de agrikulturaj instrumentoj kaj maŝinpartoj; ĉirkaŭ 90 procentoj de la gubernioj jam fondis siajn fabrikojn aŭ riparejojn de agrikulturaj maŝinoj kaj per ili forte subtenas la agrikulturan produkton. En 1970, la kvanto de man-traktoroj, dizeloj, malgrandaj hidraŭlikaj generatoroj kaj akvoradaj pum-



piloj provizitaj de Guangdong-provinco al agrikulturo multe superis tiun de 1969, kaj la kvanto de la duonmekanikaj agrikulturaj instrumentoj por draŝado, transplantado de rizidoj, dispecigo de fojno kaj elpremo de oleo estas pli ol unuoble super tiu de 1969. Per ekipaĵoj produktitaj de la mezgrandaj kaj malgrandaj fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj en sia loko, Ĝinĉeng-gubernio de Ŝanhi-provinco ekipis pli ol 140 elektrajn pumpstaciojn kaj pli ol 490 putojn de elektraj pumpiloj, instalis pli ol 390 kilometrojn da alttensia elektrofadeno kaj tute aŭ duone mekanikigis la laborojn de muelado, draŝado, elpremo de oleo, dispecigo de fojno kaj sensemigo de kotoneno en granda parto de komunumoj kaj brigadoj. En nemalmultaj gubernioj de la tuta lando jam unuapaŝe fondiĝis reto por fabrikado kaj riparado de agrikulturaj maŝinoj kaj fundamente

efektivigis malgranda riparo de agrikulturaj maŝinoj en brigado, meza riparo en komunumo kaj granda riparo en gubernio. Per sia subtenado industrio akcelas la disvolviĝon de agrikulturo kaj per sia riĉa rikolto agrikulturo siavice akcelas la disvolviĝon de industrio, tiel ke aperis la bonega situacio de duobla riĉa rikolto en industrio kaj agrikulturo de nia lando.

Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “Estas necese jesi pri tio, ke la ekonomia konstruado de nia lando prenas pezan industrion kiel la centron. Sed samtempe oni nepre devas plene zorgi la disvolviĝon de agrikulturo kaj malpeza industrio”, la provincoj kaj regionoj, kie estas subevoluinta malpeza industrio, aktive fondas fabrikojn de ŝpino kaj teksado, sukero, kemiaj kaj aliaj objektoj de ĉiutaga uzo por produkti varojn por la vivo de la loka popolo. En

*Ĝiangsu-provinco ekspluatas Sunan-karbominejon sin apogante sur propraj fortoj. Jen estas ministroj en laboro ĉe la ŝakto.*




1970, Hejlonggiang-provinco produktis pli ol 300 specojn de produktaĵoj de malpeza industrio kaj kemia industrio multe bezonataj de la merkato. Ankaŭ la malpeza industrio de Liaŭning, Kinghaj, Ninghia, Guanghi, Junnan k.a. ricevis rapidan disvolviĝon kaj per tio altigis la kapablon de memprovizo de ĉiutagaj bezonaĵoj de tiuj lokoj.

En ĉ. 300 gubernioj kaj urboj de nia lando jam stariĝis malgrandaj ŝtalfabrikejoj. Por ŝanĝi la neracian fenomenon "transporti nordan karbon al sudo", la sudaj provincoj disvolvis grandskalan amasan movadon por serĉi kaj ekspluati minon. La produktokvanto de karbo de tiuj provincoj en 1970 kreskis je ĉirkaŭ 70 procentoj kompare kun tiu de 1969.


Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ "sinapogi sur propraj fortoj" kaj "peneme lukti en malfaciloj",

la diversaj lokoj disvolvis mezgrandajn kaj malgrandajn industriajn entreprenojn sinapogante sur la saĝo de la amasoj, lokaj materialoj kaj simplaj metodoj, tiel ke la produkto ricevis rapidan disvolviĝon. La vastaj amasoj de laboristoj kaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de la diversaj lokoj starigis por si la devizon: mem fari la necesajn ekipaĵojn, lerni teknikon en la praktikado kaj mem serĉi la necesajn materialojn; kaj tiamaniere ili rapide starigis malgrandajn industriajn entreprenojn. Utiligante materialo-restaĵojn de grandaj fabrikejoj en sia loko, la urbo Ĝengĝoŭ de Henan-provinco produktis pli ol 110 specojn de ĉiutagaj bezonaĵoj; kaj el forĵetaĵoj, kiaj gaso, skorio kaj likvaĵo, oni fabrikis multajn produktaĵojn, inter kiuj sole la kemiaj materialoj, kiaj kaŭstika sodo, sulfata acido, kupra sulfato, jam nombriĝas pli ol dek, kaj tiel turnis forĵetaĵon en valorajon.

*Laboristoj de la Ŝigiaĝuang-a Fabrikejo de Aŭtopecoj de Hebej-provinco muntas kamionon de marko Dongfeng.*








*En Jantaj-regiono de Ŝandong oni fondis per facile disponeblaj rimedoj lokan malgrandan ŝtalan kombinumon kaj per tio akcelis la disvolviĝon de industrio kaj agrikulturo kaj subtenas la konstruadon de nacidefendo.*

*Multaj guberniaj malgrandaj nitrogen-sterkaj fabrikoj estas nove fonditaj en Giangsu-provinco. Jen kemisterko estas transportata al kamparo de la diversaj lokoj.*



# Vizito al Erdaŭhezi

**L**ASTATEMPE ni vizitis la kvartalon Erdaŭhezi de la urbo Ĉangĉun. En la lastaj pli ol dudek jaroj, dank' al la saĝa gvido de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, Erdaŭhezi gigante ŝanĝiĝis kaj nun ĝi staras antaŭ ni kun tute nova fizionomio.

## AREGO DA FABRIKOJ

Antaŭ la Liberiĝo, en Erdaŭhezi regis malprospero, tie estis nur tre malmultaj fabrikoj kaj la kelkaj butikoj bankrotis unuj post aliaj. Post la Liberiĝo, en tiu dezerto leviĝis multaj modernaj fabrikoj, inter kiuj estas fabrikoj de traktoroj, mekanikaĵoj por konstrulaboroj, generatoroj, kemisterko, tavolligno, kotonteksaĵoj k. a. La respondeculo de la revolucia komitato de la traktora fabriko diris al ni: "Nun ni jam transiris de soltipa produkto al produkto de multaj novaj tipoj de traktoroj. En la pasinta jaro, ni mem projektis kaj produktis novan tipon de traktoroj 'Ĉangĉun-40'. Tia traktoro estas malpli granda, konsumas malpli da hejtaĵo sed donas pli grandan povon. Ĝi estas facile manipulebla, taŭga por uzo tiel en sudo kiel en nordo de nia lando kaj tre bonvena al la amasoj."

En Hinhua-presejo de Ĉangĉun ni vizitis maljunan laboriston Ju Ĝinĉeng. En la aĝo de 15 jaroj li fariĝis lernoservisto en iu presejo en la manoj de la japana imperiismo. Ĝi nun fariĝis Hinhua-presejo. Ju Ĝinĉeng kun indigno kaj malamo diris: "Tiam la presejo estis fabriko de krimoj; ĝi presis sennombrajn monbiletojn por kruele ekspluati nin laborantan popolon." Parolante pri la grandaj ŝanĝoj post la Liberiĝo, li diris kun senlima emocio: "Sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ni transformis la fabrikon, kiu suĉis la sangon de la popolo antaŭe, en presejon posedatan de la popolo. Nun la tuta presa laboro en la fabriko jam estas mekanikizita." En la

Granda Proletara Kultura Revolucio, por helpi en pli bona propagando de Maŭzedongpenso, la vastaj presistaj amasoj tagnokte laboris kaj ĉiam strebis al pli alta kvalito en presado de brilaj verkoj de Prezidanto Maŭ. La nombro de la ekzempleroj de verkoj de Prezidanto Maŭ presitaj de ĝi inter 1967 kaj 1969 egalas al tiu de la 17 jaroj antaŭ 1967.

La Medikamenta Fabriko "Ruĝa Flago" de Balipu-komunumo estas malgranda kaj la plejparto de ĝiaj laboristoj estas virinoj, kiuj liberigis ĵus el dommastrumado por servi al la revolucio. En la pasintaj kelkaj jaroj, la laboristoj de la fabriko mem konstruis fabrikdomojn kun plankareo de pli ol 1,000 kvadrataj metroj, mem fabrikis kaj reformis preskaŭ 10 ĉefajn ekipaĵojn. Ili produktis ne nur ordinarajn medikamentojn, sed ankaŭ 4 drogojn de relative alta klaso. En 1970, la laboristoj ne uzis eĉ unu groŝon de la ŝtato kaj mem fabrikis ekipaĵojn, kaj sukcesis fabrikii altklasan drogon en nur 15 tagoj per loke disponeblaj rimedoj. La laboristoj de la fabriko de varmopremaj formi-maŝinoj de Heŝun-komunumo, kiun starigis ok laboristinoj devenintaj de dommastrinoj, disvolvis la revolucion spiriton kuraĝe pensi kaj kuraĝe agi, plene rompis la "misterecon de elektrona industrio", kaj sukcesis fabrikii en 1970 tri specojn de produktaĵoj bezonataj de elektrona industrio.

Enirinte en la grandajn sepdekajn jarojn, sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ ke "**Ĉinio devas fari relative grandan kontribuon al la homaro**", la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj de Erdaŭhezi, strikte ligas sian propran laboron kun la monda revolucio, forte tenas revolucion kaj energie stimulas produkton. La produktokvanto de Tavolligna Fabriko estas 20-oble pli granda ol tiu en la komenca periodo post ĝia fondiĝo, kaj la produktokvanto de la unua jarduono de 1970 altiĝis je 16% pli ol tiu de la sama periodo de 1969.



La situacio de revolucio kaj produkto de la tuta kvartalo fariĝas pli kaj pli bona kaj aperas senĉese novaj produktaĵoj, novaj teknikoj kaj novaj sukcesoj; mekanikaĵoj, kemiaj produktaĵoj kaj konstruaj materialoj estas senĉese transportataj aliloken en grandaj kvantoj por subteni la socialisman konstruadon de la patrolando.

Enveturinte en la straton Dongŝeng de Erdaŭhezi, unue ni vidis gigantan portreton de Prezidanto Maŭ imponantan en la komercocentro kaj ambaŭflanke de la portreto ruĝajn tabulojn kun vortoj de Prezidanto Maŭ. Kvar vicoj da salikoj etendiĝas orienten laŭ la larĝa strato Gilin kaj aspektas kvazaŭ naturaj verdaj galerioj. Rekte viciĝantaj grandaj domoj de fabrikoj kaj novaj loĝdomoj duone kaŝiĝas en la verdaĵoj, ĉiuj stratoj grandaj aŭ malgrandaj estas puraj. Kamionoj kaj aŭtobusoj kuras sinsekve sur ili en ambaŭ direktoj. Vidante ĉion ĉi tion, kiu povus kredi, ke tie estis mizera kvartalo antaŭ la Liberiĝo?

Maljuna laboristo Song Ĝanlin, kiu multe suferis sub la premado de la japana imperiismo, kun senlima malamo rakontis al ni la tragikan pasintecon de la loĝantoj de Erdaŭhezi.

Antaŭe Erdaŭhezi havis nur tri malgrandajn vilaĝojn en kiuj loĝis nur po dekelkaj familioj. Tiam, la damnindaj japanaj agresantoj faris Ĉangĉun la centro de sia reakcia regado super la popolo de nordorienta Ĉinio. Tial ili pelis la loĝantojn de la urbocentro al Erdaŭhezi sur la orienta bordo de Jitonghe. La tieaj malriĉuloj sin nutris per faruno el kverksemoj kaj loĝis en kabanoj el lignaj tabuloj, tra kiuj enpenetris vento. Kamarado Song Ĝanlin estis unu el la miloj kaj miloj da malriĉuloj. En tiu tempo, lia familio kun sep homoj de tri generacioj interpretis sin en unu ĉambro de tia kabano. Somere, en la domaĉo pluvetis, dum pluvis ekstere, kaj en vintro prujno aperis sur la muroj, se ekstere neĝis.

Antaŭ la Liberiĝo, en Erdaŭhezi ĉie fluis fetora akvo kaj amasiĝis rubaĵoj; kuloj kaj muŝoj svarmis en la aero kaj malsanoj ofte minacis la loĝantojn; amase vagadis almozuloj kaj ofte vidiĝis malsatmortintoj. Krome ĉiujare okazis superakvo.

Sed nun Erdaŭhezi havas tute novan fizionomion. Kelkcent altaj pluretaĝaj domoj kaj tegoltegmentitaj domoj el ruĝaj brikoj anstataŭis la kabanojn kaj formiĝis tie nova loĝkvartalo por laboristoj. Ĉi tie estas laborista klubo, magazenoj, manĝajvendejoj, poŝtejo kaj banko. Ĉe la fame konata haladza lageto aperis bela parko. La fetoraj mal-

fermaj kloakoj estas transformitaj, kaj ambaŭflanke de la stratoj nun estas ebenaj trotuaroj; ĉiuj stratoj grandaj kaj malgrandaj estas asfaltitaj. Ne estas plu la sceno: "polvo svarmas en serenaj tagoj, kaj post pluvo sin etendas koto."

Antaŭ la Liberiĝo, la loĝantoj trinkis akvon tre maldolĉan el putoj, sed nun ĉiuj familioj havas dolĉan akvon el kranjoj. La malpuran akvon el subteraj kloakoj oni utiligas por irigacii kampojn. La antaŭe inundema Jitonghe nun estas barita kaj formis akvokonservejon je la mezo, tiel ke la rivero alportas ne katastrofon, sed utilon.

Kun la fluga disvolviĝo de industria produkto, rapide disvolviĝas ankaŭ trafiko kaj la aferoj de kulturo, edukado kaj higieno. Antaŭ la Liberiĝo ĉi tie estis nur unu linio de aŭtobuso, sed nun seninterrompe cirkulas modernaj trolebusoj kaj aŭtobusoj fabrikitaj de ni mem. Antaŭ la Liberiĝo ĉi tie estis nur kelkaj elementaj lernejoj, sed post la Liberiĝo oni establis pli ol 40 elementajn lernejojn kaj preskaŭ 20 mezlernejojn kaj la gefiloj de la vasta laboranta popolo havas la ŝancon ĝoje lerni en lernejoj. La higiena afero de Erdaŭhezi havas eĉ pli grandan disvolviĝon. En la kvartalo oni instalas sanitarajn kaj stacion kontraŭ epidemioj kaj en ĉiu loĝpunkto oni instalas sanitaran stacion kaj sanprotektejon.

## MASTRO DE LA ŜTATO


Post la Liberiĝo, la vastaj amasoj de laboranta popolo, kiuj suferis de krueleĝaj subpremado kaj ekspluatado de la japana imperiismo kaj la kuomintangaj reakciuloj, fariĝis mastroj de la ŝtato. Sub la nutrado de Maŭzedongpenso ili sane kreskas.

En la malnova socio, kvar generacioj de la familio de maljuna laboristo Ĵong Zifeng laboregis kiel bovoj kaj ĉevaloj ĉe bienuloj kaj kapitalistoj kaj suferis de ĉiaj subpremoj kaj ekspluatadoj. Nun, inter liaj dek familianoj lia filo laboras kiel fervojisto, la bofilino estas estrino de la revolucia komitato de la loĝantaro de la loko. El liaj filino, du nepoj kaj tri nepinoj, iuj fariĝis laboristoj, aliaj iris post la fino de lernado en mezlernejo al kamparo por akcepti reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj la ceteraj lernas en mezlernejo aŭ elementa lernejo. Lia dua nepino Ĵong Cajkin, kiu lernas en la Sesa Mezlernejo de Ĉangĉun, estis elektita de la amasoj en la revolucian komitaton de la kvartalo. Krom unu infaneto, ĉiuj naŭ membroj de la familio de Ĵong Zifeng estas aktivuloj de viva studo kaj viva apliko de

verkoj de Prezidanto Maŭ. Reprezentante la familion, liaj filino kaj bofilino ĉeestis la Kongreson de Aktivuloj de Viva Studo kaj Viva Apliko de Maŭzedongpenso de Gilin-provinco, li kaj lia unua filo ĉeestis respektive la Kongreson de Aktivuloj de Viva Studo kaj Viva Apliko de Maŭzedongpenso de Ĉangĉun kaj tiun de la Ŝenjang-a Fervoja Buroo. Antaŭ dek jaroj Ĵong Zifeng jam rajtis emeritiĝi, sed li havas ruĝan koron kaj ĉiam zorgas nur la revolucion kaj ne volantas ripozi senlabore en la hejmo prenante pension, sed volas labori pli multe por la socialisma revolucio. En 1970, li sukcesis krei levilon por konstruado. Li diris: "Dank' al la ŝirmo de Prezidanto Maŭ, mi povas vivi ĝis hodiaŭ. Estas mia plej granda feliĉo, ke mi povas pli multe kontribui al la revolucio."

En la nova socio ŝanĝiĝis ĉio, la sklavoj fariĝis la mastroj de sia patrolando. En la lastaj jaroj, la maljuna laboristo Lju Zigian de la Ĉangĉun-a Ŝovelila Fabriko disvolvis la saĝon kaj talenton de la laborista klaso kaj konstruis kune kun aliaj laboristoj multajn maŝinojn, per kiuj ili ne nur plibonigis la kvaliton de la produktaĵoj sed ankaŭ oble grandigis la laborefikecon. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, li klopodis vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson kaj fariĝis laboristo kun "kvin bonoj" de la fabriko. En 1969, komisiite de la laboristoj de la fabriko, li iris al Pekino por partopreni revuadon de la parado okaze de la 20-a datreveno de la nacia festo kaj kun granda feliĉo vidis la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ.

*Grandaj nombroj da traktoroj produktitaj de la Ĉangĉuna Traktora Fabriko en la kvartalo Erdaŭhezi estas transportataj al la kamparo por subteni la agrikulturan produkton.*





# Vuŝenĝaŭ-stepo en Bolado

**B**LANKAJ nuboj ŝvebas sur la lazura ĉielo kaj viglaj brutaroj plezure sin paŝtas ĉie sur la stepo. Komenciĝis operacio por batalakiri de la dezerto grenon kaj herbon. Tie ĉi estas la popola komunumo Vuŝenĝaŭ — ruĝa flago de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio en “**lerno de Daĝaj en agrikulturo**”.

## KONSTRUI NOVAN STEPON UNUANIME

En la komenca periodo post la Liberiĝo, pli ol duono de la 1,400 kvadrataj kilometroj da tero de Vuŝenĝaŭ estis kovrita de moviĝemaj sablomontetoj, kaj la ceteraj partoj de la stepo estis dividitaj de sablaj montetoj de diversaj grandecoj en multajn etajn paŝtejojn. Sur la senlima areo de sablomontetoj kreskis abunde ĉeval-ebriigaj herboj kaj la naturaj katastrofoj de vento, sablo, sekego, akvostagno, parazitoj ktp. serioze minacis la vivon de la popolo kaj la disvolviĝon de la bredado de brutoj.

La liberigitaj malriĉaj paŝtistoj plenis de arda entuziasmo kaj neelĉerpebla energio. Strikte sek-vante la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ, ili suriris la larĝan vojon de socialismo. En la jaro 1958, la ĝenerala linio “**streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie**” persone ellaborita de Prezidanto Maŭ rapide diskoniĝis tra Vuŝenĝaŭ-stepo kaj stimulis la koron de ĉiu paŝtisto. Kamaradino Baŭjiledaj, bona filino de la malriĉkampa-raj kaj malsuperaj mezkamparanoj varme propa-gandis Maŭzedongpenson al la komunumanoj. Ŝi diris emocie: “Tio, kion la malnova socio donis al Vuŝenĝaŭ, estis mizero kaj suferoj. Hodiaŭ ni konstruos ĉi tie per niaj manoj novan stepon socialisman!”

Ĉeval-ebriiga herbo estas granda malutilaĵo sur Vuŝenĝaŭ-stepo. Ĝin manĝinte, negrave toksita ĉevalo malgrasiĝas kaj grave toksita mortas. En

la jaroj de la granda antaŭensalto, antaŭ ĉio la komunumanoj klopodis elimini tiun herbaĉon. En julio kaj aŭgusto, sur Vuŝenĝaŭ-stepo flirtis ruĝaj flagoj kaj ondiĝis kantoj. Vasta armeo de laboran-toj peneme luktis tie dekojn da tagoj spite al brula varmego kaj sablovento, prenante la stepon kiel sian manĝejon kaj dormejon, kaj forigis la ĉeval-ebriigan herbon sur la paŝtejoj kun areo de cent dudek mil muoj. En tiu jaro, mortis de tokso nur centono de la brutoj kaj la nombro de brutoj kreskis je 32 procentoj. La kolektiva forto kaj la venko akirita en la unua batalo multe altigis la memfidon de la vastaj amasoj de paŝtistoj en komple-ta elimino de tiu herbaĉo. Kaj post kelkfoja amasa klopodo por forigo de ĝi, fine Vuŝenĝaŭ-komunumo fundamente eliminis tiun herbaĉon sur la paŝtejoj kaj sukcesis redukti la morto-procenton de brutoj ĝis malpli ol centono.

## PRATEMPA DEZERTO ALPRENIS NOVAN FIZIONOMION

La venko super ĉeval-ebriiga herbo faris revo-lucian ŝanĝon al la penso de la paŝtistoj kaj forte frapis la feŭdajn kaj superstiĉajn pensojn disvas-tigitajn de la ekspluata klaso. La vastaj amasoj de paŝtistoj vidis propraokule potencon de la ko-lektiva forto de la popola komunumo, kaj ankoraŭ pli grandskala amasa movado por venki la movi-ĝeman sablon kaj reformi la paŝtejojn vigle dis-volviĝis en Vuŝenĝaŭ.

En la pasinteco, Vuŝenĝaŭ-stepo aspektis de-zerte. En ĉiu vintro kaj ĉiu printempo, potenca uragano ruliĝis al ĝi de sur Ordos-altebenejo movante sablomontetojn kaj kovris per ili paŝtejojn unujn post aliaj. Pro ventegoj kaj manko de akvo, la herboj sur la stepo maldense kreskis nanaj. De kiom da jaroj la vastaj amasoj de komunumanoj de Vuŝenĝaŭ deziris venki la moviĝeman sablon kaj kateni “la flavan drakon”!

En aŭtuno, spite al muĝanta sablovento la paŝtistoj portis surdorse dezertajn artemiziojn kaj sablosalikojn (*Salix Gordejevii*) de dekelkajn liojn malproksime kaj ilin plantis sur sablomontetoj. Post la plantado, ili konstruis al ili protektajn ĉirkaŭmurojn kaj digojn, akvumis ilin per siteloj kaj dank' al ilia prizorgo pli ol 80 procentoj de la sablosalikoj viviĝis.

En profunda vintro, flava ventego alruliĝis kun grandaj neĝflokaj tra la tuta horizonto. Spite al frostoj, la paŝtistoj fosis per pioĉoj sur la frostiĝinta tero, forportis sablon kaj ŝtonojn por krei irigaciajn kanaletojn kaj putojn kaj reformi per tio la paŝtejojn.

Post la obstina batalo de dek du vintroj kaj dek du printempoj la vastaj amasoj de komunumanoj de Vuŝenĝaŭ akiris grandan venkon en reformo de sablaj dezertejoj dank' al la kolektiva forto de la popola komunumo. En tiuj dek du jaroj, ili

fiksis pli ol cent mil muojn da moviĝemaj montetoj kaj turnis pli ol sepdek du mil muojn da sablomontetoj en paŝtejojn herboriĉajn. Kaj ili kulturis pli ol 1,700 muojn da arbaroj kontraŭ sablovento kaj por ligno. La fruktoarboj plantitaj de ili jam komencis doni abundajn fruktojn. Krome ili konstruis ankaŭ pli ol 70 herbajn ĝardenojn kun kampoj, arbaro kaj herbo. Tiuj ĝardenoj estas ĉirkaŭataj de herbozaj terbuloj, salikaj bariloj aŭ pikildratoj, kies totala longo estas pli ol 250 kilometroj. Tiuj ĝardenoj garantias la disvolviĝon de la brutobredado per siaj riĉaj herbejoj.

### NOVA HOMO EDUKITA PER MAŬZEDONGPENSO

Vizitante Vuŝenĝaŭ oni ofte aŭdas laŭdojn de la vastaj amasoj de paŝtistoj pri ilia bona gvidanto kamaradino Baŭjiledaj, kiu estas la estro de la revolucia komitato de la komunumo. Antaŭ pli ol 20 jaroj, la Liberiga Armeo sub la komando de la

*Kamaradino Baŭjiledaj (maldekstre en la fronta vico), estro de la revolucia komitato de Vuŝenĝaŭ-komunumo, profundigas en la paŝtejojn kaj studas la "tri popularajn artikolojn" kune kun la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj.*





savanto Prezidanto Maŭ savis tiun ŝafist-knabinon tiam naŭjaran el la surtera infero kaj ebligis al ŝi novan vivon. La skurĝo de la brutoposedanto instruis ŝin malamegi la malnovan socion; la varmo de la ruĝa suno havigis al ŝi profundan klasan amon al Prezidanto Maŭ. En ordinara tempo, ŝi pene studas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj serioze transformas sian mondkoncepton. En batalado kontraŭ klasaj malamiko, ŝi montris sin firma kaj brava; en transformo de la naturo kaj forigo de ĉeval-ebriiga herbo, ŝi organizis 60 sturmajn grupojn, kaj tiuj peneme luktis sub ŝia gvido. En plantado de dezertaj artemizioj kaj sablosalikoj, ŝi laboregis same kiel fortaj viroj. En 1969, Baŭjiledaj glore ĉeestis la Naŭan Tutlandan Kongreson de la Partio kaj estis elektita kiel membro de la Centra Komitato. Post la Naŭa Kongreso, ŝi revenis de Pekino al la komunumo kaj denove komencis batalon kun la komunumanoj sub sia gvido. En la sabla dezerto,

ili kreis sedimentajn kampojn per alkonduko de inundakvo, fosis irigaciajn kanalojn kaj konstruis putojn; ili drenis akvon de marĉaj areoj por konstrui kampojn kaj reformis salalkalajn terpecojn.

En la pasintaj 12 jaroj, Vuŝenĝaŭ-komunumo kontribuis al la ŝtato pli ol 66,000 brutojn, pli ol 97,000 pecojn da feloj kaj pli ol 800,000 ĝinojn da lano. En 1970, la totala nombro de ĝiaj brutoj jam kreskis ĝis 100,700 kiu estas pli ol unuoble pli granda ol tiu de 1958; kaj krome ili produktis multe da greno. En la unua jaro de la Kvara Kvinjara Plano de nia lando, la unuiĝintaj diversnaciecaj popolanoj de Vuŝenĝaŭ firme decidis fari kontribuon al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la patrolando per sia praktika agado.

### *Ŝafaroj de Vuŝenĝaŭ-komunumo*



## Nova Entrepreno sur Gobio

**E**N nordokcidenta parto de nia lando, sur la vasta Gobio, kie ofte blovas sabla ventego, estas avangarda unuo fame konata per peniga entreprenado — la Liujuan-a Dizellokomotiva Sekcio de la Unua Fervoja Inĝeniera Buroo.

La laboristoj de la sekcio bone plenumas sian laboron sur Gobio, tenante en la koro la revolucion tuton, ĉiam konservas la revolucion tradicion de penema luktado en malfaciloj, daŭre disvolvas la movadon por pliprodukto kaj ŝparo kaj atingis grandajn sukcesojn. De la Granda Proletara Kultura Revolucio, ili mem fabrikis 779 instalaĵojn, maŝinojn kaj instrumentojn, kiuj okupis 80% el la totala kvanto de ekipaĵoj de la sekcio. Ekde 1968, ili mem faris kompletan riparon de lokomotivoj, mem galvanizis lagrojn kaj riparigis volvaĵojn de tirmotoro; dank' al tio ili ŝparis por la ŝtato pli ol 2,930,000 juanojn. Por pli multe kontribui al la socialisma konstruado, ili kreis en 1970 du landajn rekordojn: nome la rekordo de rapideco en kompleta riparo de lokomotivo kaj tiu de redukto de oleokonsumo de lokomotivo. Per la lasta, ili ĉiujare ŝparas por la ŝtato 300,000 juanojn.

Frue en vintro de 1965, pli ol 30 laboristoj de dekkelkaj vaporlokomotivaj sekcioj de la lando venis al Liujuan por starigi dizellokomotivan sekcion. La loko estis nomata Liujuan ( Salika Ĝardeno ), sed tie oni vidis, anstataŭ salikojn, nur senakvan sablejon. Ĉi tie estis nek fabriksdomoj, nek ekipaĵo, sed troviĝis nur unu staplo kaj tri ilmaŝinoj. Sed la laboristoj konsciis, ke socialisma entrepreno ne devas atendi pretan ekipaĵon, sed devas krei ĝin mem per penema luktado en malfaciloj, nome krei novan dizellokomotivan sekcion sub la malfacilaj kondiĉoj.

Fervojistoj armitaj per Maŭzedongpenso brave iris renkonte al malfaciloj kaj penigaj laboroj. Post kelkjara malfacila penado, la laboristoj de la Liujuan-a Lokomotiva Sekcio kreis per mem elpen-

sitaj metodoj kelkcent diversajn instalaĵojn, maŝinojn kaj instrumentojn. Ili konstruis iom post iom komencante de nulo novan dizellokomotivan sekcion unuan sur la nordokcidenta altebenejo de nia lando.

En 1968, plejparto de la lokomotivoj de la Liujuan-a Lokomotiva Sekcio atingis la difinitan irdistancon kaj bezonis kompletan riparon.

En kompleta riparo oni devas malmunti pli ol 20,000 akcesoraĵojn kaj partojn de la tuta lokomotivo, kontrolis aŭ, se necese, riparigis ilin unun post alia kaj poste remuntis kaj provis, por ke ĝi atingu la teknikan normon. Por tio oni bezonas vastan lokomotivejon, grandan arganon kaj kompletan da maŝinoj, instrumentoj kaj instalaĵoj por fari la diversajn necesajn laborojn. Kaj cetere oni devas havi grandnombrajn rezervpecojn por anstataŭado. Sed Liujuan havis nenion. Tiam iuj proponis sendi lokomotivojn al granda fabriko por riparigi ilin. Ili diris: "Liujuan estas malgranda dizellokomotiva sekcio kaj ne havas ekipaĵon por kompleta riparo. Prefere sendi lokomotivojn aliloken." Sed tio bezonus longan tempon kaj kaŭzus atendadon de lokomotivoj. Krome tio alportus grandajn perdojn. Kun tiu problemo la revolucia komitato de la sekcio gvidis la laboristojn studi ripetade la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "Se ili ( la laboristoj, kamparanoj kaj laborantaj intelektuloj ) ekposedas sian sorton, sekvas la marksism-leninisman linion kaj ne evitas problemojn, sed aktive solvas ilin, ĉiu ajn malfacilo en la mondo estas solvebla". La instruo multe kuraĝigis ilin. La laboristoj estis plenaj de energio kaj decidis trovi rimedojn por fari kompletan riparon de lokomotivoj sur Gobio.

Por provizi sin per specialaj instrumentoj necesaj en kompleta riparo de lokomotivoj, la laboristoj, kiuj ĵus venis al la ripara grupo, sub la gvido de ĝia estro Vang Diange, alportis amason da malnovaj



ŝtalaj platoj kaj forĵetitajn pecojn. Kaj per revolucia energio ili studis dum riparado, fine elfaris pli ol 300 specialajn instrumentojn oportune uzeblajn por malmunti kaj remunti la grandnombrajn pecojn kaj partojn de lokomotivo post ripetada esplorado kaj zorga provado, kaj per tio pliapaŝe armis sin.

Pro manko de 30-tuna argano por levi la dizelon de lokomotivo, la laboristoj povis nur enrampi tra la kontrola truo de dizelo por fari sian laboron malgraŭ la sufoke malplaĉa odoro de fumaĵo kaj oleo. Tiam penigan laboron la laboristoj konkure prenis sur sin; kun la spirito de penema kaj konsciencia laborado ili venke plenumis la taskon. Ĝis nun, ili jam sukcesis fari kompletan riparon por kelkdek dizellokomotivoj.

La sekcio havis eluzitan dizellokomotivon kaj la fabriko kiu konstruis la lokomotivon proponis raporti pri ĝia neuzebleco. Sed komunisto Jang Ĵujking proponis, ke ili mem riparu la lokomotivon. La propono tuj ricevis subtenon de la sekcia revolucia komitato kaj la vastaj laboristaj amasoj. Sub la iniciato de Jang Ĵujking kaj aliaj veteranaj laboristoj, la laboristoj de la tuta sekcio kun plena revolucia entuziasmo firme decidis mem revivigi la lokomotivon.

Rebonigi la dizelon estis la ŝlosila problemo de revivigo de la lokomotivo. Multaj pecoj de la

maŝino difektiĝis. Du platoj longaj pli ol du metrojn servantaj por plifortigi la dizelkorpon serioze deformiĝis, tio kaŭzis delokiĝon de la truoj de pli ol cent keĵoj kaj bezonis denovan truigon post veldoplenigo. Sed tiu laboro devis esti tre precize farita kaj la tolereco ne devis superi kvaronon de la diametro de haro. La laboristoj kreis kompletan da simplaj metodoj kaj fabrikis frezilon kun alta precizeco kaj solvis la problemon de truigo kaj enigo de keĵoj.

La plej malfacila afero tamen estis reguligi kaj mezuri la samcentrecon de la truoj de krankŝafto. Tio estas tre komplika tekniko kaj la tolereco ne devas superi 0.05 milimetron. Sed ĉi tie ne troviĝis bezonata preciza optika instrumento por tion fari. La laboristoj prunteprenis ordinaran nivelilon por mezuri la samcentrecon. Sed ili malsukcesis en kelkdek fojoj. Ili kunsidis por detale analizi por trovi rimedon, kaj fine venis al la ideo uzi nivelilon lige kun lupeo. Post pli ol 30 fojoj da mezuro, reguligo kaj korekto, ili sukcesis en mezurado kaj laŭ la mezurita eraro fine precize ĝustigis ĝin.

Tiel, ili venkis la teknikajn malfacilojn unun post alia, riparis kaj mem fabrikis pli ol dek mil maŝinpecojn kaj akcesoraĵojn kaj sukcesis revivigi la "eluzitan" lokomotivon dank' al la subteno de frataj institucioj.

## Gastejo en Profundaj Montoj

SONG HIN

**E**N Junnan-provinco ĉe la sudokcidenta limo de nia lando troviĝas gastejo ĉe la talio de Ava-monto.

Antaŭ nelonge en tiu gastejo okazis jeno. Iu onklino de va-nacieco iris al Banlaŭ por viziti sian plijunan fraton. Ĉar ŝi unuafoje vojaĝis sola kaj ne bone konis la ĉirkaŭaĵon, ŝi perdis la vojon trairante densan arbaron en profundaj montoj. Kiam ŝi atingis la gastejon post vojaĝo de kvin tagoj, ŝi jam forkonsumis la kunportatajn monon

kaj manĝaĵon. Servistinoj de la gastejo afable akceptis ŝin kaj pretigis por ŝi manĝon kaj liton. Krome, laŭ indikoj de la onklino ili trovis por ŝi la adreson de ŝia frato post klopodado. Por ke la maljunulino sekure atingu la celokon ili lasis ŝin tie atendi ĝis la tria tago kaj tiam komisiis ŝin al leterportisto, kiu estis survoje al Banlaŭ, por ke la lasta akompanu ŝin al ŝia frato. Hodiaŭ la onklino kune kun sia frato speciale venis al la gastejo por esprimi dankon. Kun emociaj larmoj

en la okuloj ŝi diris al aliaj vojaĝantoj en la gastejo: “En la malnova socio mia edzo mortis de penlaborado por feŭda ĉefo, kaj miaj kvin infanoj ĉiuj mortis de malsato kaj malsano. Estas la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ kiuj savis min el morto. Nun, dank’ al bona gvido de nia amata Prezidanto Maŭ, mi, kiu perdis vojon dum vojaĝo kaj forkonsumis la kunportatajn monon kaj manĝaĵon, ricevis tiel fervoran prizorgon de kamaradinoj de la gastejo.” Aŭdinte tion multaj tre korduŝiĝis kaj laŭdadis: “Jes, veninte ĉi tien, ni sentas varmecon en la koro, kvazaŭ ni venus en nian propran hejmon.”

Tiu gastejo estas avangarda kolektivo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso en Junnan — Banhong-a Gastejo de la Cangjuan-a Va-a Aŭtonoma Gubernio.

La Banhong-a Gastejo situas sur la grava vojo inter Banlaŭ kaj Cangjuan kaj estas unusola en ĝia ĉirkaŭaĵo de proksimume cent lioj. La gastejo administrata de 4 virinoj kun meznombra aĝo de 40 jaroj ĉiutage akceptas 70-80 vojaĝantojn.

En aprilo de 1965, kiam la gastejo estis ĵus starigita, ĝi alfrontis multajn malfacilojn en materialoj. La kabanoj kun ses ĉambroj kiujn ili prenis kiel restoracion kaj gastejon sin trovas en du lokoj kaj tio tre maloportunis al la laboro.

Komence, tiuj servistinoj ĉiuj ne tiom volontis labori en la gastejo kaj montris sin flegmaj al la vojaĝantoj. Tute ne pensante ke la vojaĝantoj venis de malproksime trans montoj kaj tre soifas aŭ malsatas, ili provizis al ili nur ŝinkon liveritan de la ŝtato, ne konsiderante pri gustoj de gastoj. Iuj eĉ kondukis malĝentile al vojaĝantoj.

Informiĝinte pri tio, la trupo de ĈPLA tie garnizonanta ofte iris al la gastejo por doni helpon kaj organizis ilin por studo de Maŭzedongpenso. Foje, kamarado Li de la trupo venis al la gastejo kunportante kun si la brilajn “tri popularajn artikolojn” de Prezidanto Maŭ. Kune kun ili li studis, kunsidis kaj disvolvis edukon per rememoro pri la pasintaj suferoj kaj pripenso de la hodiaŭa feliĉo. Dank’ al tio ili ekkonis la signifon de sia laboro kaj komprenis ke servi al la popolo estas glora afero.

Vespere servistino Vu Guohin revenis hejmen kun peza koro. La tragikaj travivaĵoj de ŝia familio antaŭ la Liberiĝo reaperis antaŭ ŝiaj okuloj. Ŝi pensis: “En la malnova socio, kiel sklavknabino de bienulo, ĉiutage mi devis ellitiĝi tre frue kaj enlitiĝi noktomeze laborante kiel bruto por la ekspluata klaso; nun la gvidantoj min postenigis ĉi tie

ja por ke mi servu al la popolo. Mi neniam devas forgesi la pasintecon.” Ŝi ekmemoris ke en la pasintaj jaroj pro manko de restoracio kaj gastejo multaj va-naciecaj fratoj kiuj iras kunveni aŭ al foiro en la gubernia urbo devis mem porti kun si rizon kaj kaldronon dum longa vojaĝo por kuiri survoje kaj tranokti sub la libera ĉielo. Pensante pri tio ŝi faris firman decidon bone labori.

En la sekvinta tago Vu Guohin kune kun Luo Canĝen kaj alia ripetade studis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ pri “**tutkora kaj tutanima servado al la popolo**”. Ili diris: “La malnova socio ne traktis nin kiel homojn, sed en la nova socio ni fariĝis mastroj de la ŝtato. Nur se ni aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ ni povos havi klaran menson.”

Post tio, ili ĝustigis sian sintenon al la laboro kaj plibonigis la servadon, ĉiamaniere kreante bonajn kondiĉojn de manĝo kaj loĝejo por vojaĝantoj. Al ili estis asignita sumo da mono por ripari domojn. Post diskutado ili unuanime opiniis, ke ili ne devas sin apogi sur la ŝtato, sed devas disvolvi la bonan tradicion de penema lukto en malfaciloj, kiel eble plej multe redukti la elspezon de la ŝtato kaj funkciigi la gastejon kun laboremo kaj ŝparemo. Ili mem kolektis arbobranĉojn kaj vektoportis akvon, kaj post penado de unu monato ili per malmulta mono riparis ĉiujn domojn de la gastejo sub la helpado de la amasoj. Ĉiuj litaĵoj en ĝi estas kudritaj kaj lavitaj de ili mem. Mankis tabloj en la gastejo, ili do fiksitis kelkajn lignajn fostojn en la teron kaj sur ilin metis tabulojn, ke tio servu kiel tabloj.

Dank’ al tia klopodo la gastejo estas en bona ordo kaj funkcias pli kaj pli bone.

La va-naciecaj popolamasoj ĉirkaŭ Banhong ne kutimis kulturi legomojn kaj bredi porkojn, tial la gastejo ofte renkontis malfacilojn de manko de viando kaj legomoj. En la pasinteco ili provizis al gastoj tiom kiom la ŝtato liveris. Foje kiam Luo Canĝen kolektis manĝilaron ŝi aŭdis plendon de iu gasto: “Kiel kara estas la manĝo!”

Tio meditigis ŝin: funkciigante la gastejon ni devas ĉiam pensi por la bono de la amasoj kaj konsideri pri iliaj ekonomiaj kondiĉoj kaj bezonoj. Ni ne devas apogi nin nur sur la ŝtato, sed devas nin apogi sur propraj fortoj kaj plivastigi la sferon de la servo. Ŝi pensis, ĉu ili povos mem kulturi legomojn kaj bredi porkojn. Ŝi diris sian ideon al la aliaj tri kamaradinoj kaj tuj ricevis ilian aprobon. Vu Guohin ĝoje diris: “Bona estas via



ideo. Funkciigante la socialisman gastejon ni devas ĉiam pensi por la vasta laboranta popolo kaj persisti en la direkto de servado al la laboranta popolo. Ni ja povos planti legomojn kaj bredi porkojn. La montdeklivo estas kulturebla por kulturi legomojn.”

Tion dirinte ili tuj ekagis. Ili elpremis labor-tempon por krei kampojn kaj kulturi legomojn kaj fari stalon. Komence ili bredis tri porkojn. Pro nebona zorgo la porkoj ofte elkuris al la kampoj por manĝi legomidojn. Tiel la legomoj ne bone kreskis kaj ankaŭ la porkoj ne grasiĝis. Tiam iu el ili iom deprimiĝis dirante: sufiĉe lacigaj por ni jam estas la laboroj de la restoracio kaj gastejo plus peklado de legomoj kaj farado de fabkazeo. Ŝtata gastejo ja dependas de la ŝtato en provizo. Por kio do ni mem nin ŝarĝu per la penado!

Kion fari? Ĉu kulturi legomojn kaj bredi porkojn aŭ ne? Ili foje-refoje studis la instruon de

Prezidanto Maŭ pri tutkora kaj tutanima servado al la popolo, kio denove levis ilian memfidon.

Ili iris en montojn por dehaki vergojn, per kiuj ili plisolidigis la stalon, tiel fundamente solvis la kontraŭdiron inter legomkulturo kaj porkobredado. Pli kaj pli multiĝis la porkoj. Por solvi la problemon de porkonutraĵo ili elpremis tempon por kulturebligi virgan teron kaj sur ĝi kulturi bataton, melopepon kaj krome iris en montojn por detranĉi sovaĝajn pizangojn, ĉiamaniere klopodante por bone bredi porkojn.

Dank’ al entrepreno de flankokupa produkto ili reduktis la elspezon de la ŝtato kaj ankaŭ memkoston de la manĝoj tiel ke la restoracio estis funkciigata ekonomie kaj konforma al la bezono de la vastaj laborantaj amasoj. La specoj de la manĝoj multiĝis de unu ĝis pli ol 10 kaj tio ricevis varman laŭdon de la vojaĝantoj.



### RIMARKINDA ATINGO DE FORSTUMO EN HINGIANG

La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj revoluciaj kadroj de diversaj naciecoj de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono aktive disvolvis forstokulturon de la komunumoj kaj brigadoj, energie plantis forstojn por fiksi sablon kaj protekti kampojn, aktive disvolvis samtempe ankaŭ forstojn por ligno, karbo kaj aliaj ekonomiaj produktaĵoj, kaj akiris rimarkindan sukceson.

Nun en la vasta kamparo sude kaj norde de Tianŝan-montaro, ĉie vidiĝas altaj poploj, juglandarboj, oleastroj, abrikotarboj, persikarboj, pomarboj, vinberarboj, morusarboj, ulmoj, tamarikoj kaj ĉinaj tamarikoj. Laŭ nekompleta statistiko, en la tuta Hingiang oni kulturis pli ol 29,000 muojn da arbidoj kaj forstumis pli ol 108,000 muojn.

Per forstokulturo, Hingiang ne nur kreis kondiĉojn por protekti kampojn kaj vilaĝojn

de sablovento kaj por pliprodukto, sed ankaŭ liveris grandan kvanton da ligno kaj arbaraj oledonaj materialoj al la ŝtato. En 1970, Hingiang liveris al la ŝtato pli ol 3,200, 000 ĝinojn da juglandoj kaj krome ĝi helpis fratajn provincojn kaj urbojn per 180,000 ĝinoj da jugland-semoj.

### ILMAŜINO DE REGATA SILICIO POR 13 SPECJOJ DE LABOROJ

Kvin malgrandaj fabrikoj de Pekino fabrikis en kunlaboro ilmaŝinon de regata silicio por 13 specoj de laboroj, kaj per tio faris novan kontribuon al la ilmaŝina industrio de nia lando.

Tiu ilmaŝino havas apartan stilon. Por ĝi oni aplikis avangardan elektronan teknikon de regata silicio. La nombro de ĝiaj pecoj, inkluzive de la ŝraŭboj, estas nur pli ol 800, multe malpli granda ol tiu de ordinara ilmaŝino. Tiu maŝino estas multkapabla, ekzemple ĝi povas fari diversajn laborojn de malgrandaj maŝinriparejoj kiaj tornado, frezo, alezo, frotumo, borado kaj sulkigo, kaj krome ĝi ankaŭ povas esti uzata por elektra velado kaj provizi akumulatoron per elektro. Ĝi tre taŭgas por ripari agrikulturajn maŝinojn kaj ekipaĵojn de mezgrandaj kaj malgrandaj fabrikoj. Portate de aŭto, ĝi povas funkcii kiel malgranda rondira riparejo kaj fari riparadon ĉe konstruejo.

# Dek Jaroj de Batalo kaj Venko

— Celebre al la deka datreveno de la fondo de la  
Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio

La 20-a de decembro 1970 estas la deka datreveno de la fondiĝo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio.

La pasintaj dek jaroj estis plenaj de batalo. La Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio plene mobilizis la popolon, firme apogis sin sur la popolo kaj kondukis la popolan militon, kaj tiel batis ĝis kapofrakaso la usonan imperiismon plej ferocan en la mondo.

Nun, kun plena fido pri nepra venko la popolo de sudo kaj nordo de Vjetnamio strikte unuiĝas kun la laosa kaj kamboĝa popoloj. Ili subtenas unu la alian kaj decidis batalakiri la kompletan venkon de la kontraŭsona naciisava milito. La grandaj venkoj de la vjetnama popolo elokvente pruvis la historian leĝon: **“La popolo de malgranda lando certe povas venki agreson de granda lando, se nur ĝi kuraĝas leviĝi al batalo, kuraĝas preni armilojn kaj mastras la sorton de sia propra lando.”**




Batalantoj de la tria roto de iu regimento de la popolaj liberigaj armitaj fortoj de la norda parto de la provinco Quang Tri de suda Vjetnamio sturmas la malamikojn.





Batalantoj de la popolaj liberigaj armistaj fortoj de suda Vjetnamio bombardas usonajn kaj pupajn trupejn.



Batalantoj de PLAF de suda Vjetnamio trafe pafas usonajn aerobanditojn.


Iu vilaĝo de la provinco Quang Tri de suda Vjetnamio situas en regiono sub kruelaj "paciga" plano kaj bombado de la sajgona uson-pupa kliko. Sed la gerila taĉmento batalanta tie ĉiam persistas en brava kaj obstina batalo, disvolvante spiriton de firma decido batali kaj venki. Laŭ raporto, de 1967 ĝis nun ĝi ekstermis pli ol 500 malamikojn kaj detruis pli ol 20 tankojn de la malamiko. Jen gerilanoj sturmas iun malamikan gvatejon.







Maldekstre: Popolanoj de la provinco Quang Tri de suda Vjetnamio aktive disvolvas politikan batalon por plifortigi la kontraŭusonon nacisatan militon.



Junuloj de iu loko de suda Vjetnamio transportas provizojn por subteni la fronton.

Sin apogante sur la propraj fortoj, sudvjetnamaj popolanoj fabrikas diversajn armilojn por ĉie ekstermi malamikojn.








Batalantoj de PLAF de suda Vjetnamio triumfe revenas kun granda nombro da militkaptitaj armiloj de usonaj kaj pupaj trupoj.

Popolanoj de liberigita regiono de suda Vjetnamio varme bonvenigas siajn proprajn batalantojn triumfe revenantajn.





# Praktiko

## Donas Saĝon

### Hejtista grupo de la Pekina Lana Teksejo

**L**A tasko de nia hejtista grupo estas provizi la tutan fabrikan per vaporo, varma akvo kaj varmo bezonataj en produkto kaj vivado. Por kontentigi la bezonon de la disvolviĝo de produkto, en 1958 ni komencis teknikan renovigon al kaldronego.

Tiutempe, ni uzis ŝovelilojn kaj korbegojn kiel instrumentojn por translokigi karbon, la laboro estis peza, la laborefikeco estis malgranda, la konsumo kvanto de karbo estis granda kaj ni ne povis garantii la necesan vapor-premon. Kiel solvi tiun problemon? Stimulate de la ĝenerala linio elmetita de Prezidanto Maŭ **“Streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”**, ni firme decidis reformi la kaldronejon per ni mem.

Sed iuj diris: **“Kion povas fari tiuj malkleruloj!”**

Ĉu **“malkleruloj”** vere ne povas fari teknikan renovigon? Kun tiu problemo ni studis la brillan filozofian verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko*. Prezidanto Maŭ instruas nin: **“Ĉia vera scio originas el rekta sperto.”** Ni ĉiuj diris: **“Praktiko donas veran scion. Se nur ni kuraĝos praktiki sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ, ni certe sukcesos fari teknikan renovigon al la kaldronejo!”** Kaj ni ekagis kiel ni diris. Ni mem sternis trakon kaj unuapaŝe malpezigis la fizikan laboron, dank’ al apliko de ĉaro anstataŭ la korbegoj. Kaj poste ni mem projektis kaj faris pontan transportan maŝinon de karbo, dank’ al kies apliko la 13 membroj de ĉiu skipo estis reduktitaj al 9.

La sukcesa fabriko de tiu maŝino ne nur liberigis nin de peza fizika laboro, sed ankaŭ liberigis nian penson. Ni ekvidis, ke teknika renovigo estas afero tute ne mistera kaj **“malkleruloj”** kun praktika sperto ja estas kompetentaj en tio! Kreskis nia memfido, altiĝis nia entuziasmo kaj ni elmetis al ni novan objekton de teknika renovigo pri ŝovelado de karbo.

Foje ni vidis ke traktoro levas kaj mallevas la plugilon post si dum plugado kaj pensis ke ĝi povos ŝoveli karbon, se ni instalos al ĝi feran ŝovelan trogon anstataŭ plugilon. Sekve ni trovis kadukan traktoron kaj transformis ĝin en ŝovelan maŝinon per niaj propraj manoj kaj tiel efektivigis la deziron **“forjeti la ŝovelilojn”**.

Sed la efikeco de tiu maŝino estis negranda kaj krome ĝi estis facile difektebla. Iu proponis transformi iun eluzitan aŭton en ole-preman karboŝovelan maŝinon. Niaj kolegoj konsentis fari provon. Sed ni nur vidis bildon pri tia maŝino kaj neniu sciis ĝian strukturon. Kion fari? Praktiko donas solvon. Iuj kamaradoj esploris la ole-preman meĥanisman de aŭto, aliaj iris al koncernaj entreprenoj por lerni kaj ni ekagis post interkonsiliĝo. Ĉiufoje kiam ni malsukcesis en la praktiko, ni klopodis resumi sperton kaj daŭrigis la praktikon poste. Ni klopodis trovi la kaŭzon post ĉiu malsukceso kaj poste korektis la projekton. Post ripetada eksperimentado, ni sukcesis elfari ole-preman karboŝovelan maŝinon, kies ŝovela kapablo estas 5-oble pli alta ol tiu de la antaŭa ŝovelmaŝino.

Poste, ni pliapaŝe reformis la transportan maŝinon de karbo. Ni elfaris transportan rimenon el malnovaj materialoj kaj krome konstruis karbotenejon kun kapacito de 10 tunoj. Kaj tiel formiĝis mekanika sistemo por provizo de karbo. Ni mem projektis kaj elfaris ankaŭ panelojn por termometroj kaj prebutonoj, per kiuj efektiviĝis aŭtomata regado de vaporpremo, livero de akvo kaj elektraj pumpiloj. Dank’ al tiu aranĝo la nombro de la 9 membroj de ĉiu skipo reduktiĝis al 5.

Kontraŭdiro estas movforto por disvolviĝo de afero. Farante teknikan renovigon, ni konis kontraŭdirojn, klopodis ilin solvi kaj progresis en ilia solvado. Post certagrada solvo de la kontraŭdiroj



en transportado de karbo, elstariĝis la kontraŭdiro de la kaldronego mem. Sekve de la disvolviĝo de produktado en la teksejo, senĉese kreskis la konsumakvanto de vaporo kaj tiam la produkto de vaporo jam ne povis plenumi la bezonon. Por solvi tiun kontraŭdiron, ni altigis la temperaturon en la kaldronego kaj pligrandigis la vaporigan kvanton. Sed sekve de la altigo de temperaturo en la forno, aperis aglomerato sur la internaj muroj en la forno, kaj oni devis ofte malfermi la pordeton de la forno por forigi la aglomeraton per fera stango. Tio estis ne nur laciga sed ankaŭ malutila al la fornomo, kaj ankaŭ malstabiligis la vaporpremon kaj malbone influis al la kvalito de produktaĵoj. Tiam iuj deprimiĝis kaj opiniis, ke la strukturo de la kaldronego ne povas akomodiĝi al la alta temperaturo kaj proponis malaltigi la temperaturon.

Ĉu altigi aŭ malaltigi temperaturon? Antaŭ tiu kontraŭdiro, ni serioze studis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **“Nenio en la mondo disvolviĝas kun absoluta egaleco, kaj ni devas opozicii kontraŭ la teorio de egala disvolviĝo aŭ la teorio de ekvilibro”**, kaj eksciis ke egaleco estas relativa kaj neegaleco estas absoluta. Malaltigi la temperaturon de la forno por akomodiĝi al la fornomoj signifas teni egalecon kaj eviti kontraŭdiron, tio estas konservativismo de pasiva tenado de egaleco. Oni povas grandigi efikecon de la kaldronego kaj efektivi pliigon de la produktoforto, nur se oni aktive solvas la kontraŭdiron akomodante la fornomojn al la alta temperaturo kaj starigas novan egalecon sur nova bazo. Ni detale esploris la formiĝon de aglomerato sur la fornomoj kaj trovis ke aglomerato ne aperas ĉe akvotuboj. Sekve ni instalas al la forno akvomalvarmigatajn murojn. Dank’ al tio, ni ne nur neniigis aglomeraton, sed ankaŭ pligrandigis la varmigatan areon dank’ al interligo de la tuboj en la akvomalvarmigataj muroj kun la akvokesto kaj altigis la vaporigan kvanton de la kaldronego je ĉirkaŭ 30 procentoj kompare kun la projektita normo.

En dek jaroj, nia grupo faris pli ol 30 teknikajn renovigojn kaj rimarkinde aliigis la kaldronejon. Kaj tiam ĉe iuj aperis memkontento. Iuj el ni eĉ diris: **“Ĉio renovigenda en nia kaldronejo jam estis renovigita, do ĉiam pli mallarĝiĝas nia vojo de teknika renovigo!”**

Ĉu estas eble por ni daŭre fari renovigojn? Resuminte la sperton de nia teknika renovigo en la pasintaj dek jaroj per la brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ, ni ekkonis: Nia kono pri la diversaj aferoj en la kaldronejo profundigis iom

post iom, procedante de supraĵo al internaĵo kaj de unu afero al alia; ankaŭ nia renovigo al la kaldronejo progresis iom post iom de simpleco al komplekco, de malalta klaso al alta klaso. Nia kono pli kaj pli disvolviĝas kaj la vojo de nia teknika renovigo pli kaj pli larĝiĝas. La opinio ke nia teknika renovigo jam venis al la kulmino montras metafizikan vidpunkton kaj tial estas obstaklo al nia teknika renovigo.

Altigis la kono de niaj kamaradoj, kaj ni decidis plene frakasi tiun metafizikan vidpunkton kaj firme starigi materiisman dialektikan vidpunkton kaj preni ĉiun **“finiĝan punkton”** de teknika renovigo kiel novan startpunkton de teknika renovigo por senĉese antaŭenpuŝi ĝin. Ni baldaŭ sukcesis fari karbopulvoran maŝinon por hejti la fornomojn per karbopulvoro. Kaj tuj post tio ni komencis fari eksperimenton de hejtado per bitumkarbo miksa kun antracito. En la komenco, iuj ne kredis ke oni povas hejti kaldronejon per antracito. Ĉu vere oni ne povas tion fari? Ni studis la instruon de Prezidanto Maŭ pri la universaleco kaj partikulareco de kontraŭdiro kaj ekkonis: Ambaŭ antracito kaj bitumkarbo estas bruligeblaj. Tio estas ilia komuna eco. Sed malsamaj estas iliaj **“karakteroj”**, ekzemple antracito estas malmola kaj bezonas altan temperaturon por ekbrulo; tio estas ĝia aparta karakterizaĵo. La aparta karakterizaĵo ĝuste estas partikulareco de kontraŭdiro. Sekve ni faris konkretan analizon pri antracito: Ĝi estas malfacile ekbruligebla, kaj se oni ne bone ĝin uzas, la cindro povas enteni relative grandan procenton de nefinbruligita karbo. Tio estas ĝiaj malavantaĝoj. Sed kiam ĝi ekbrulas, ĝi donas altan temperaturon. Do ĝi tamen havas sian avantaĝon. Konsiderante tiujn karakterizaĵojn de antracito, ni faris ripetatajn eksperimentojn kaj fine trovis metodon por hejti per bitumkarbo miksa kun antracito. Nun granda kvanto da antracito estas uzata por hejti industrian kaldronejon, kio antaŭe estis rigardata kiel neebla.

La sukceso en hejtado per bitumkarbo miksa kun antracito konigis al ni, ke aferoj povas transformiĝi sub certaj kondiĉoj. Se nur ni jam konas la leĝojn de disvolviĝo de aferoj kaj kreas certajn kondiĉojn, ni povas puŝi aferojn transformiĝi al stato favora al la popolo. Laŭ tiu vidpunkto, ni energie faris sintezan utiligon de materialo kaj energio kaj kreis riĉaĵojn por la ŝtato per utiligo de la antaŭe forĵetitaj akvo, vaporo, varmo kaj materialo.

# Ni Ĝikin – Stariginto de Nova Mondrekordo de Vira Altsalto

**E**N la 8-a de novembro 1970, nia eminenta sportisto Ni Ĝikin transsaltis la altecon de 2.29 metroj en la Ĉangŝa-a Laborista Stadiono en Hunan kaj tiel rompis la malnovan mondrekordon de 2.28 metroj en vira altsalto konservitan de la sovetia sportisto V. Brumel dum multaj jaroj.

Tio estas granda frukto akirita de niaj sportistoj dank' al viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, diligenta sintrejnado por la revolucio kaj akirado de gloro al la socialisma patrolando, ekde la Granda Proletara Kultura Revolucio.

Ni Ĝikin kun alteco de 1.84 metroj estas nun 29-jaraĝa. Frue en 1963, kiam li ĵus atingis sian 21-an jaron, li jam saltis trans la altecon de 2.20 metroj kaj enviciĝis inter la elstaraj altsaltistoj de la mondo. En novembro 1966, li kreis elstaran atingon per transsalto de 2.27 metroj en la Azia Sporta Kunveno de Novleviĝintaj Fortoj okazinta en Pnompeno.

La 3-an horon posttagmeze de la 8-a de novembro 1970, Ni Ĝikin venis al la konkursejo kun plena vigeleco. En tondrado de aplaŭdoj, li komen-

cis salti de la alteco de 1.98 metroj. Laŭvice la horizontala stango leviĝis al la alteco de 2.03, 2.13, 2.18 kaj 2.24 metroj, kaj li sukcese transsaltis tiujn altecojn, kion la tuta stadiono varme aplaŭdis de tempo al tempo.

Nun la horizontala stango montris la altecon de 2.29 metroj. Tiam en la tuta stadiono regis absoluta silento, kaj pli ol 80,000 spektantoj turnis sian rigardon al Ni Ĝikin. Kun emocio li rigardis la stangon kaj komencis salti per bravaj, rapidaj kaj decidemaj paŝoj. Fine, en la dua provo li venke transsaltis la altecon de 2.29 metroj.

La sukceso tuj vekis huraĵojn en la tuta stadiono. Ni Ĝikin entuziasme kriis kun levitaj manoj kune kun la rigardantaro: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Longe vivu Prezidanto Maŭ!" La tuta stadiono dronis en ĝojego.

Same kiel la aliaj ĉinaj eminentaj sportistoj, Ni Ĝikin sane kreskas sub la nutrado de Maŭzedongpenso. Lia rapida kresko plene montras la ĉiuf flankan zorgemon de la Partio kaj popolo al la



*Ni Ĝikin interparolas kun sportistoj pri komprenaĵoj en viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ.*





*Ni Ĝikin (la maldekstra) entuziasme instruas al geknaboj la arton de altsalto.*

juna generacio kaj la senkomparan superecon de nia socialisma sistemo.

Ni Ĝikin naskiĝis en la fame konata apudmara urbo Hiamen de suda Ĉinio. Li amas sporton jam de sia knabeco kaj montris sian lertecon en altsalto. En amatora sporta lernejo por geknaboj kaj gejunuloj, li ricevis sisteman trejnadon. Samtempe, sub la fervora edukado kaj helpado de la partia organizo kaj la kamaradoj, li ekposedis la penson altsalti por la revolucio kaj starigis al si la altan ambicion gajni gloron por la socialisma patrolando.


En 1959, li sukcesis en la ekzameno por eniri la Pekinan Fizikkulturan Instituton. Lia konscio pri diligenta kaj penema sinekzerco por disvolvi la fizikkulturan aferon de patrolando fariĝis ankoraŭ pli alta. Pro tio ke li havis klaran pensan movforton, li strebadis ĉiam al pli alta nivelo en tekniko kaj kreis sian propran stilon de altsalto. En 1966, li fine levis sian altecon de salto ĝis 2.27 metroj, nur je unu centimetro sub la mondrekordo konservata de Brumel.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, Ni Ĝikin konscie remuldis sian mondkoncepton per la "tri popularaj artikoloj" kaj estis elektita

kiel aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso sinsekve en 1969 kaj 1970.

De pluraj jaroj li konstante iras al fabrikoj kaj kamparo kune kun aliaj sportistoj por akcepti reedukon de laboristoj kaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj prezenti sian arton por ili. Foje, li kaj aliaj sportistoj iris al iu fabriko en antaŭurbo de Pekino, la laboristoj demandis lin kun zorgemo: "Kian gradon vi nun atingis en trejnado de altsalto, juna Ni? Strebu rompi la mondrekordon por gajni gloron al Prezidanto Maŭ kaj nia laborista klaso!" La varma espero multe stimulis lin. Nelonge poste, li iris viziti la ekspozicion pri la elstara komunisma batalanto Vang Guofu (pri tiu vidu EPĈ, n-ro 7, 1970). La revolucia spirito de Vang Guofu donis al li profundan edukon kaj plifirmigis lian decidemon por rompi la mondan rekordon de vira altsalto.

Dum trejnado Ni Ĝikin ĉiam kuraĝe eltenas pezan penadon kaj grandan lacecon. Tiel en frostoj kiel en varmego li obstine persistas en sinekzerco. Dum trejnado li ekzercis sin konscie en malfavoraj kaj rigoraj kondiĉoj, kaj tial en la nomita sporta kunveno li fine konkeris la altecon de 2.29 metroj, kreante la altan rekordon de vira altsalto en la mondo.



## Arboj de

# Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio

**A**RBOJ de amikeco inter Ĉinio kaj Albanio — la oleolivaj arboj transplantitaj el Albanio, refoje floris pompe kaj donis abundajn fruktojn sur la vasta tero de nia lando en la pasinta jaro. Ankaŭ vivplene kreskas la unua generacio de oleolivaj arbidoj zorge kulturataj de niaj arbistoj. Tio simbolas, ke la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Albanio herediĝas de generacio al generacio kaj ĉiam konservos sian verdecon.

En la jaro 1964, kiam Ĉefministro Ĝou Enlaj vizitis Albanion, kamarado Mehmet Shehu, prezidento de la Konsilantaro de Ministroj de Albanio, donis en la nomo de la registaro kaj popolo de Albanio karan donacon al nia lando — dek mil oleolivajn arbidojn. Reveninte de Albanio, Ĉefministro Ĝou Enlaj persone partoprenis la plantadon de la arbidoj en Forstejo Hajkoŭ en Junnan-provinco. En 1966, kiam kamarado Shehu vizitis

*Albana specialisto instruas teknikon de pritondo de oleolivaj arboj.*







*Laboristino de la kultivejo ĝoje rikoltas fruktojn de amikeco inter Ĉinio kaj Albanio.*

nian landon gvidante la Albanan Partian kaj Registaran Delegacion, li iris al Hajkoŭ kaj butis oleolivajn arbojn. En 1968, kiam Huang Jongŝeng, estro de la Ĝenerala Stabo de ĈPLA, vizitis Albanion, kamarado Beqir Balluku, ministro de Nacidefendo de Albanio, donacis al nia lando nombron da oleolivaj arbidoj. Tiuj arbidoj jam estis plantitaj kaj bone kreskas en niaj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj Junnan, Guanghi, Gujĝoŭ, Siĉuan, Guangdong, Hubej, Hunan, Gianghi, Ĝegiang kaj Anhuj. Poste, oleolivaj arboj estis plantitaj ankaŭ en Ŝaŭŝan, la hejmloko de Prezidanto Maŭ, kaj en la revoluciaj sanktejoj Ginggang-montaro kaj urbo Zunji.

De kelkaj jaroj, kun profunda proletara internaciisma sento al la frata albana popolo, sub la direktado de albanaj specialistoj, la laboristoj, teknikistoj kaj sciencistoj de forstejoj kulturantaj oleolivajn arbojn zorge flegas kaj kulturigas la arbidojn transplantitajn el trans milo da montoj kaj dek-milo da riveroj kaj ebligis al la arboj flori kaj frukti

en iuj lokoj de suda parto de nia lando. En 1970, la oleolivaj arboj refoje donis abundajn fruktojn en Forstejo Hajkoŭ de Junnan, Forstejo Sanmengiang de Liuĝoŭ de Guanghi, Instituto pri Forstkultura Scienco de Hubej, la Forstkultura Eksperimentejo de Ĉongking kaj aliaj unuoj. Por esplori la leĝojn de kreskado de oleoliva arbo, la vastaj amasoj de arbistoj, teknikistoj kaj sciencistoj elkulturis en nia lando unuan generacion de oleolivaj arboj per metodoj kiaj plantidokulturado, markotado kaj greftado kaj senĉese plivastigas areon por kulturigi oleolivajn arbojn, kaj tiel enskribis novan ĉapitron en la historion de la amikeco inter Ĉinio kaj Albanio.

Oleoliva arbo estas longviva ligneca oledona arbo bonkvalita kaj fruktoraĉa. Ĝia frukto estas nigre purpura kun formo de olivo. Ĝia sekigita frukto entenas 50-70% de oleo. La oleo havas bonan kvaliton. Krom en manĝado, la oleo estas uzata ankaŭ en farmacio kaj industrio.



# Por Urga Bezono

## de la Vjetnama Popolo

**J**E la 19-a de junio 1970, iu eksporta organizo en Ŝanhajo ricevis urĝan taskon, nome: liveri al la vjetnama popolo kvanton da legom-semoj en 15 tagoj.

“Ni nepre plenumos, kion niaj vjetnamaj fratoj bezonas.” Kaj intensa laboro tuj komenciĝis. Iuj rapidis mendi la bezonatajn legom-semojn ĉe koncernaj organizoj; aliaj preparis pak-materialon.

Sed en Ŝanhajo, junio ne estas tempo por semi legomojn. Tial legom-semoj ne estis facile troveblaj. Kion fari? La koncernaj kamaradoj kune lernis la instruon de Prezidanto Maŭ: “La sepcent-miliona ĉina popolo, same kiel antaŭe, firme subtenos la vjetnaman popolon konduki ĝis la fino la kontraŭusonon nacisavan militon.” Sub la gvido de la Revolucia

Komitato de Ŝanhajo, ili iris al multaj popolaj komunumoj kaj produktaj brigadoj ĉirkaŭ Ŝanhajo por aĉeti la bezonatajn legom-semojn.

La koncernaj popolaj komunumoj kaj produktaj brigadoj tuj akceptis tiun taskon kiel la plej gravan kaj plej urĝan mision. Informiĝinte pri la bezonoj de la vjetnamaj fratoj, la komunumanoj ekmemoris la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ: “Ni estas najbaraj landoj kun intima rilato kiel tiu inter lipoj kaj dentoj. Niaj du popoloj estas fratoj dividantaj inter si feliĉon kaj malĝojon.” Ili esprimis, ke ili nepre kolektos legom-semojn en kiaj ajn malgrandaj kvantoj kaj ilin portos al la aĉetejo de kiom ajn longaj distancoj.

En iu produkta brigado, oni suk-

cesis kolekti nur 35 gramojn da legom-semoj. Tamen, kun profunda amikeco al la vjetnamaj fratoj ankaŭ la brigadestro iris 15 kilometrojn por ĝin porti al la aĉetejo. Li diris: “Ĉiu semo reprezentas nian koron. Ni 700-miliona ĉina popolo ĵuras esti firma subtenanto de la vjetnama popolo. Mi alportas tiujn 35 gramojn da legom-semoj ja por plenumi la instruon de Prezidanto Maŭ: firme subteni la popolojn de la tri hindoĉiniaj landoj por forpeli la usonajn rabistojn!”

Dank’ al la fervora subtenado de tiuj popol-komunumanoj, la aĉetado estis efektiva en nur sep tagoj, kaj oni sendis la bezonatan kvanton da legom-semoj ĝustatempe al niaj vjetnamaj fratoj.



### PRODUKTI FERON EL SKORIO

La Hingi-a Kemia Fabriko de Ŝulu-gubernio de Hebej-provinco produktis feron utiligante forĵetaĵon en produkto de sulfurata acido kaj tiamaniere kreis materialon necesan por la

gubernia kaj komunuma industrio en subteno al agrikulturo.

Tiu fabriko produktas sulfuratan acidon el sulfuroza fer-erco, el kiu oni utiligis nur sulfuron sed forĵetis la feron en la skorio kiel senutilaĵon. Laŭ tiu stato, laboristoj proponis produkti feron el la skorio. Post interkonsiliĝo, la gubernia revolucia komitato decidis organizi kelkajn fabrikojn por kunlabori kun la Hingi-a Kemia Fabriko en konstruo de malgranda altforno. Dank’ al aktiva klopodado de la laboristoj, malgranda altforno kun volumeno de 12 kubmetroj estis konstruita en nur 57 tagoj. Tiu nove konstruita altforno jam komencis regule produkti feron, kies kvalito tute atingis la normon.



# Ilicio

**E**N la Halo de Lokaj Produktaĵoj de la Ĉina Foiro de Eksportaj Varoj okazigita en Kantono de nia lando estis eksponita ilicia frukto uzata kiel spico. La flavegaj fruktoj similaj al lignogravuritaj floretoj odoris densajn parfumojn, kio altiris grandan intereson de vizitantoj.

Ilicio estas ĉiamverda arbusto. Ĝian frukton oni uzas kiel spicon en manĝado kaj stomakfortigan drogon kaj stimulilon en farmacio. El la fruktoj, grajnoj kaj folioj de ilicio oni povas ekstrakti volatilan ilicioleon, kiu estas materialo por fari parfumaĵon. La produktaĵoj ĝuas bonan reputacion en la merkato de nia lando. Precipe ilicia frukto produktata de la Donghing-a Diversnacia Aŭtonoma Gubernio de Guanghi estas eksportata al la sudorienta Azio, Afriko, Latin-ameriko kaj Eŭropo kaj ĝuas bonan akcepton en la internacia merkato.

Antaŭnelonge, ni faris viziton al Ŝivandaŝan de la nomita aŭtonoma gubernio — produktejo de ilicia frukto. La suno brilas, arboj densas kaj montoj majeste leviĝas unu super alia. En la arbustaro de ilicio diversnaciecaj gekomunumanoj sin okupis pri kolektado de fruktoj, kaj sur la vastaj liberaeraj sekigejoj oni prilaboris kaj sunumis ĝin. Kamiono post kamiono plensarĝita de bone pakitaj iliciaj fruktoj galopis sur la ŝoseo rekte al la haveno.

Veturante antaŭen laŭ la ŝoseo apud monto, ni atingis profundejon de Ŝivandaŝan kie koncentre loĝas jaŭaj, ĝuangaj kaj hanaj popoloj. Banbrigado honorata kiel nova jaŭ-vilaĝo de Ŝivandaŝan situas ĉe monttalo. Kiam ni ĵetis rigardojn ĉirkaŭen starante sur monto, ni vidis ke sur branĉoj de la densa verda arbustaro de ilicio pendas abundaj fruktoj. Kiam alblovis zefiro, ĉie tra la montoj odoris freŝa parfumo, kio ja estas pitoreska pejzaĝo.

La sekretario de la partia filio de la brigado nin akceptis. Montrante la senliman ilician arbustaron, li diris al ni: Dank' al Maŭzedongpenso la popoloj de la jaŭa nacio reformis la dezertajn ŝtonozajn montojn. Precipe depost la komenco de la Granda

*Jaŭ-naciecaj komunumanoj sunumas fruktojn de ilicio.*



Proletara Kultura Revolucio, aktive respondante la alvokon de Prezidanto Maŭ pri "Ierno de Daĝaj en agrikulturo", ili kulturebligis virgajn terpecojn sur la montoj, kulturis grenon kaj plantis arbidojn kaj tiel novigis la fizionomion de la dezertaj montoj.

Kun la spirito de montotranslokigo de la Mal-saĝa Avo, la tieaj vastaj amasoj de komunumanoj firme decidis transformi la naturon. Gejunuloj organizis sin en sturmaj grupoj kiuj en tagoj hakis montojn kaj kulturebligis virgajn terpecojn, kaj en

noktoj kun torĉoj konstruis akvokonservujojn kaj plantis iliciidojn. De la pasintaj tri jaroj la tuta brigado plimultigis 120 muojn da durikoltaj kampoj kaj plantis pli ol 1,400 muojn da ilicio. Krome ili venkis multajn malfacilojn kaj sukcese fosis kanalon trans kelkajn montetojn kun totala longeco de 15 lioj, alkondukis la fontakvon al la kampoj kaj arbusta zono kaj tiel garantiis riĉan rikolton de greno kaj ilicio. En 1970, la brigado rikoltis 100,000 ĝinojn da iliciaj fruktoj kaj per tio kontentigis bezonon de la merkato en- kaj ekster-landa.



#### LETERO DE NOVZELANDA LEGANTO M. L.

En 1970 komenciĝis la finaj jardekoj de la dudeka jarcento kaj daŭradis la evoluo de la moderna Ĉinio.

Per la paĝoj de EPĈ ni legis pri la burĝonantaj industrioj ŝipkonstrua, elektrona, petrola kaj maŝin-fabrika.

La antaŭenigo de scienca agrikultura esplorado kaj la disvastigo de teknika helpo al fremdaj landoj estis plene detalitaj.

En 1970 elstaris la lanĉo de la unua artefarita satelito kaj aparte atentenda estas la disvolviĝanta rolo de Ĉinio en internacia diplomatio, rolo spegulanta la grandecon kaj potencon de la Ĉina Popola Respubliko.

Kiel do fariĝos Ĉinio en la venontaj tri jardekoj?

Ĉinio daŭre amasigos industrian forton enlande kaj politikan influon kaj respekton ekstere. En jaro 2000 Ĉinio akiros pli grandajn sukcesojn en industria produktado. En ĉiuj sferoj de homa agado surtera kaj ekstertera Ĉinio elstaros. La ĉina ŝiparo alportos varojn al ĉiuj partoj de la mondo kaj ĉinaj specia-

listoj troviĝos ĉie aplikante sian spertecon al la junaj ekonomioj de aziaj, afrikaj kaj sudamerikaj landoj.

La komenciĝon de ĉio ĉi ni povas vidi nun en la nuna jaro 1970 de la nuna jardeko. La maturiĝon de ĉio ĉi ni povos vidi baldaŭ kiam alvenos la plej imponega epoko de la ĉina historio.

Sur kiun do falos la respondeco pri ĉio ĉi?

Ĝi falos sur la ĉinan popolon, kiu transformis Ĉinion en modernan industrian ŝtaton.

Ĝi falos sur la Komunistan Partion de Ĉinio, kiu malgraŭ feroca persekutado kuraĝis batali kaj fine venkis kaj tiel ŝanĝis la fizionomion de la tuta lando.

Kaj ĝi plej grave falos sur Prezidanton Maŭ Zedong, kiu decideme, genie kaj sukcese gvidas Ĉinion al ŝia brila estonto.

Frontante la venontajn tri jardekojn, la ĉina popolo kaj amikoj en ĉiuj landoj povas tutkore kaj unuvoĉe krei la instruon de Prezidanto Maŭ:

"Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn!"

La suprajn opiniojn mi bazas plejparte sur 5-jara legado de EPĈ.

Mi deziras al vi plenan sukceson kaj prosperon en la nova jaro.

#### LETERO DE ALBANA LEGANTO F. B.

Malgraŭ ke mi estas tre okupita pro miaj aferoj, mi trovas liber-

tempon por serioze tralegi nian karan revuon. Tie oni rakontas bele pri diversaj temoj, kaj dank' al tio vasta legantaro povas kontentiĝi. Al mi plaĉas precipe artikoloj pri eduka temo. Mi multe lernis el la sperto de biologia fakultato de Ĝongŝan-universitato, kiu estis skribita en 11-a numero de 1970. Mi intencas traduki kaj publikigi tiun skribon en nia universitata gazeto.

Veran intereson ekscitas al mi ankaŭ la rubrikoj pri la praktika apliko de filozofiaj instruoj, kiujn vi jam kelkfoje aperigis en la paĝoj de EPĈ.

#### LETERO DE JUGOSLAVA LEGANTO R. M.

Post kelkaj tagoj venos Novjaro (Ĉi tiun leteron skribis nia leganto R. M. antaŭ la fino de la pasinta jaro — *La Redakcio*), kaj foriros la malnova jaro plena de sukcesoj en terkulturo kaj industrio kaj en la lanĉado de la unua satelito. Mi esperas kaj deziras ke via lando sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio atingos pli grandajn sukcesojn.

Mi skribis al vi ĉar mi interesiĝis pri *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Pri tiu nemorta verko mi daŭre interesiĝas. Eble vi povas sendi al mi aŭ skribi, kie mi povas aĉeti ĝin.

"Popoloj de la tuta mondo, unuiĝu kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn!"





## NOVA VEKIĜO DE LA JAPANA POPOLO

Alte tenante la flagon de patriota batalo kontraŭ imperiismo, la heroa japana popolo ne timas perfortan subpremadon, brave batalas kaj peze batis la agresan kaj militan politikon antaŭenpuŝatan de la japanaj kaj usonaj reakciuloj.

La okinava popolo sub la jugo de la usonaj okupantaj trupoj ne timas subpremon de la japanaj kaj usonaj reakciuloj, faris en januaro de 1970 du grandajn kontraŭusonajn strikojn, kiuj sinsekve daŭris sep tagojn, tiel ke la usonaj bazoj sur la tuta insulo dronis en ĥaoso kaj paraliziĝo. Je la 20-a de decembro de la pasinta jaro, por protesti kontraŭ la perfortaĵoj de la usonaj agresaj trupoj, la popoloj de la urbo Koza sur Okinavo levis potencan kontraŭusonan ŝtormon en la "urbo de bazo" fanfaronita de la usonaj trupoj kiel "sankta kaj netuŝebla". La manifestaciantoj indigne batis la usonajn agresajn trupojn per ŝtonoj kaj brulboteloj, tiel ke la bazo de la usonaj trupoj falis en konfuziĝon.

La japana popolo certe venkos ĉiujn malfacilojn kaj obstrukcojn sur la vojo de marŝo kaj gajnos novan venkon.

## LA HISPANA POPOLO LEVIS NOVAN ALTAN TAJDON KONTRAŬ LA FAŜISMA PERSEKUTADO

Je la 29-a de decembro de 1970, loĝantoj de la hispana ĉefurbo Madrido kaj multaj aliaj urboj okazigis strikon kaj manifestacion por protesti kontraŭ la barbara verdikto farita de la hispana reacia milita juĝejo pri mortigo al 6 baskaj demokratiaj batalantoj kaj pri malliberigo de pli ol 300 jaroj al la aliaj 9 demokratiaj batalantoj.

Je la 29-a, laboristoj de la madrida laborista kvartalo okazigis grandan strikon kaj manifestacion por protesti kontraŭ la maljusta verdikto de la reacia milita juĝejo. En la dua granda urbo de Hispanio Barcelono, la manifestaciantoj obstrukcis la trafikon ĉirkaŭe de la placo Cataluna. En Quevedo norde de Madrido, nombro da manifestaciantoj laŭte kriis kontraŭfaŝismajn sloganojn kaj disdonis broŝurojn.

La nova sanga subpremo de la faŝisma reĝimo de Franko povas nur veki pli intensan oponon de la hispana popolo kaj akceli la pli fruan disfalon de la faŝisma regado de Franko.

## MANIFESTACIIS LA POPOLOJ DE LA OKCIDENTA KAJ NORDA EŬROPO

La krimea persekutado de la hispana faŝisma diktatora reĝimo de Franko al la baskaj demokratiaj batalantoj vekis indignan proteston de popoloj de Francio, okcidenta Germanio, Italio, Belgio, Svisio, Danio kaj aliaj pluraj landoj.

En Francio: 5,000 homoj de Parizo faris protestan manifestacion en la 29-a de decembro de 1970. En

*Italaj popolanoj manifestacias en Romo por protesti kontraŭ la vizito de la milita monstro Nixon al Italio por intriga aktivado.*




la granda urbo Toulouse en la sudokcidento 2,000 homoj manifestaciis en la 28-a. Trapasante stratojn de la urbo, la manifestaciantoj kriis laŭte: "Franko — faŝisma murdisto!"

En okcidenta Germanio: La 29-an, en kelkaj grandaj urboj eksplodis amasa protesta manifestacio. En Frankfurt, la indignaj manifestaciantoj ĵetis brulbotelojn al la konstruaĵoj de la hispana ĉefkonsulejo kaj disrompis per brikoj la fenestrajn vitrojn de la filio de hispana banko en Frankfurt.

En Italio: En la 28-a, loĝantoj de Romo, Milano kaj aliaj urboj okazigis protestan manifestacion. La romaj manifestaciantoj iris al la hispana ambasadoro por protesti kaj disdonis flugfoliojn. Sur la tabuloj en iliaj manoj estis skribite: "Franko — ekzekutisto!"

Ankaŭ la popoloj de Belgio, Svisio, Danio kaj Aŭstrio okazigis manifestacion kaj indigne kondamnis la krimon de la faŝisma reĝimo de Franko en persekutado al la baskaj demokratiaj batalantoj.

*Popolanoj de Okinavo indigne forbruligas aŭtojn de la usona armeo ĉe la usona aerarmea bazo Kadena.*



*Amasoj de Parizo manifestacias por protesti kontraŭ la barbara persekutado de la hispana faŝista diktatora reĝimo de Franko al la baskaj demokratiaj batalantoj.*





## *Sur la kovrilo:*

Ĝang Vanking (la maldekstra), aktivulino en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, kaj Tang Kiaŭfeng, laboristino kun kvin bonoj, ambaŭ de la Ŝpinteksa kaj Prestinktura Kombinumo de Hangĝoŭ, kontrolas produktaĵon.

## *Sur la dorskovrilo:*

Angulo de la ŝpinteksa laborejo de la Ŝpinteksa kaj Prestinktura Kombinumo de Hangĝoŭ

**EL POPOLA ĈINIO** 人民中国报

**Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO**  
**P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio**

**N-ro 3 (152) 1971**

## **Ĉefa Enhavo**

Solena Kunveno en Pekino por Celebri la 10-an Datrevenon de la Fondiĝo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio

Batalaj Agloj Nevenkeblaj

Heroaj Virinoj Vjetnamaj

Vizito de Nia Tablotenisa Teamo Eksterlande

Plej Sonora Estas la Kanto "Ruĝas la Oriento"

Pri Trifoja Ŝanĝo de Nomo

Fine Rebatas la Koro de Cong Kinghong

Ĉiam Esti Pioniro en la Tri Grandaj Revoluciaj Movadoj

Ĉie en Nia Lando Floras Lokaj Mezgrandaj kaj Malgrandaj Industriaj Entreprenoj

Vizito al Erdaŭhezi

Vuŝenĝaŭ-stepo en Bolado

Nova Entrepreno sur Gobio

Gastejo en Profundaj Montoj

Praktiko Donas Saĝon

Ni Ĝikin — Stariginto de Nova Mondrekordo de Vira Altsalto

Arboj de Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio

Ilicio

# Niaj Amikoj Sin Trovas

## Ĉie tra la Mondo

“Intima amiko trans maro proksimas ja kvazaŭ najbaro.” Ambaŭ popoloj de Ĉinio kaj Albanio ligigas koron kun koro. Jen la albana urbo Stalin okazigis kunvenon de amikeco inter Albanio kaj Ĉinio por varme bonvenigi la Ĉinan Laboristan Delegacion.





Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso vaste populariĝas tra la tuta mondo. La revoluciaj bataloj de la diverslandaj popoloj vige disvolviĝas kaj la kontraŭsona unuecfronto senĉese plifortiĝas kaj plivastiĝas. Niaj internaciaj rilatoj ĉiam pli disvolviĝas kaj niaj amikoj sin trovas ĉie tra la mondo.




Ĉiam verdas la batala amikeco de la ĉina kaj korea popoloj formita el sango. Jen la Amika Delegacio de la Ĉina Popolo ricevas varman bonvenigon de oficiroj kaj soldatoj de iu trupo de la Korea Popola Armeo dum la vizito.


“Inter Vjetnamio kaj Ĉinio ja profundas l’ amikeco: samideaneco plus frateco.” La ĉina kaj vjetnama popoloj subtenas kaj kuraĝigas unu la alian en la longdaŭra batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, kaj tiel starigis inter si profundan batalan amikecon. Jen intima intervidiĝo kaj varma brakumo de artaj batalantoj de Ĉinio kaj Vjetnamio.



Diverslandaj popolanoj varme aklamas la sukcesan lanĉon de la unua artefarita tera satelito de nia lando. Jen laboristoj de la Popola Respubliko de Kongolando aŭskultas la sonoran melodion *Ruĝas la Oriento* elsenditan de la satelito.







La solena deklaro de Prezidanto Maŭ publikigita je la 20-a de majo 1970 “Popoloj de la Tuta Mondo, Unuiĝu kaj Venku la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn!” estas granda programo, laŭ kiu la ĉina popolo kune kun la mondaj revoluciaj popoloj batalas kontraŭ imperiismo. Jen junaj laboristoj kaj studentoj de Jamaguĉi-gubernio, Japanio, faras manifestacion en la urbo Ivakuni, alte tenante tabulojn kun sloganoj kia “firme subteni la deklaron de Prezidanto Maŭ Zedong”.



La kamboĝa popolo varme amas la grandan gvidanton de la ĉina popolo Prezidanton Maŭ. Jen kamboĝaj popoloj respektive rigardas la brilan figuron de Prezidanto Maŭ.

Grekaj maristoj ĉe ĉina haveno studas *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*.



Mozambikaj gerilaj batalantoj konstante studas kaj aplikas Maŭzedongpenson en la batalo. Jen ili studas la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "El la pafilo venas ŝtatpotenco".





